

Sennacieca Revuo



Organo de la Tutmonda Laboristaro
Antaŭe Esperantista Laboristo

Klera homo estas ti-kiu konas sian taskon en la vivo kaj, laŭ siaj fortoj, penadas plenumi ĝin.
L. Tolstoj

Jara abono: Anglio, 5 ŝil.; Aŭstrio, 150 kr.; Belgio kaj Francio, 9 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 30 lev.; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 25 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 6 kr.; Germanio kaj Finnlando, 25 mk.; Hispanio kaj Portugalio, 7 pes.; Hungario, 60 kr.; Italio, 12 lir.; Nederlando, 3 g.; Polio, 300 mk.; Svisio, 6 sv. fr.; Usono, 1 1/4 dol.
Oni pagu prefere per monbiletoj aŭ bankĉekoj. — La abonoj komenciĝas en Januaro kaj Julio.

REDAKCIO: **E. LANTY**

24, Boulevard Beaumarchais — PARIS XI (Francio)

ADMINISTRACIO: **L. GLODEAU**

177, Rue de Bagnole — PARIS XX (Francio)

NIA ĈEFA TASKO

Ni kutimiĝu al eksternacia sent-pens-kaj agadkapablo.

Kvazaŭ obsede mi ripetas tiun frazon. Koncize ĝi entenas la tutan celon de S. A. T., kaj nia organizaĵo sukcesos kaj plenumos sian taskon proporcie je la penetrigo de tiu ideo en la cerbon de la kamaradoj. Ĝi devas fariĝi nia morala direktilo, nia kriterio pri taŭgeco de niaj klopodoj kaj praveco de niaj decidoj.

Eksternacia sentkapablo: Ni unue sentkapablas pri ni mem, poste kaj laŭvice pri niaj familianoj, samurbanoj kaj samlandanoj.

Koncerne la plejmulton de la homoj tie finiĝas ilia sentkapablo. Kial? Malofte ni havas okazon esti tuŝataj de influoj venantaj el eksterlando. Tial nia menso estas ĉefe rezultajo el naciaj inspiroj ĉiuspecaj.

Homoj bonkoraj koncerne siajn familianojn kaj samnacionojn, fariĝas, dum krizaj aŭ militaj tempoj, plej kruelaj koncerne eksterlandanojn. Patrioto povas esti en sia lando tre pacema homo. Eksplosas milito, li fariĝas sangavida mortgemo. Li ĝojas ekscianta pri malfeliĉejoj okazintaj en „malamika“ lando. Lia kompatato por la suferoj de siaj samnacionoj, nur multobligas sian malamon al la „malamiko“. Nur nacie li estas sentkapabla. Ĉefa tasko nia estu do pliampleksigi nian sentkapablon.

Eksternacia penskapablo: Nunepoke la popoloj estas ĉiulande pli malpli regataj laŭ demokrata sistemo. La vera potenco kuŝas en la manoj de ti-kiuj posedas rimedojn por formi la opiniojn. Ĉar la gazetaro kaj eldonindustrio estas en la manoj de kapitalistoj, ĉi-lastaj estas do la solaj potenculoj. Ili regas la pensojn de la popolamaso, kapablante klaĉadi milionezemplere plej egajn mensogojn kaj silenti pri plej sciindaj aferoj.

La persona profito de tiuj potenculoj identiĝas kun tiu de la ŝtato — fakte ili estas mem la ŝtato, konsekvence ili formas la opiniojn laŭ nacia celo; ili kreas nacieman spiriton.

Malgraŭ rapidveturiloj, senfadena telegrafo kaj aliaj modernaj translandlimaj kulturiloj, la popoloj estas tamen ĉirkaŭataj de nevideblaj baroj starigataj de lertaj manoj.

Estas do necesega tasko utiligi nian supernacian organismon por interrilati kiel eble plej ofte kaj intime kun ĉiulandaj kamaradoj¹⁾. Nur tiele ni povos imunigi nin kontraŭ la abomena naciismo-patriotismo.

Por esti supernacie penskapabla ni bezonas gazeton pli kaj pli valora kaj ampleksa, pli kaj pli ofte aperanta. Urĝas ankaŭ eldoni literaturon konceptitan laŭ sennacieca, vere humana spirito.

Jam ni projektis la verkaĉon de socialisma-komunisma antologio tutmonda. Eble pli urĝas eldoni porinfanan historilibraron. Niaj infanoj devas lerni pri la vivo de la vere eminentaj homoj, kies genio kaj grandkoreco ne povis esti entenataj en la kadro de iu ajn nacio. Ĉiuj noblaj sennaciuloj devas esti konataj kaj honorataj anstataŭ reĝoj, militistoj kaj senskrupulaj ŝtatistoj.

Parolante pri eksternacia penskapablo, tio signifas, ke la fonto de niaj informoj devas esti vere sennaciece objektiva.

Eksternacia agadkapablo: Per tiu lasta esprimo mi komprenas ĉion, kio koncernas vojaĝojn, forkurojn dum militaj tempoj, interŝanĝon de infanoj ktp.

Kiel vivantan ekzemplon mi nur citu la eldonon de nia gazeto: La eldonejo estas en Francio kaj la presejo en Germanio. Nia konstanta kunlaborado kun kamaradoj

(1) Post la eldono de nia Jarlibro ni povos diri: „kun ĉiusektoraj kamaradoj“. Iuj vortoj ne estas malatentindaj: Daŭre ripetataj ili fariĝas vivaj kaj enkarnigas en ni la ideon de ili signitan.

Richter kaj *Lerchner* ebligas la ĉiumonatan eliron de S. R. en 16—20 paĝa amplekso. Tio certe estas atentinda rezultajo — ne parolante pri la morala flanko, pri tiu ebleco pli bone interkonatiĝi per tiu kunlaborado.

Estas vere, ke negocistoj povas ankaŭ trovi profiton en similaj interrilatoj. Sed la diferenco estas en tio, ke negocisto celas personan profiton dum ni estas nur instigataj de idealaj motivoj. Interrilatoj sen idealo, samkiel idealo sen interrilatoj estas ambaŭokaze nesufiĉaj por alprogsimigi la popolojn.

Kreante kaj kreskigante superŝtatan, supernacian organison ni ebligas la aliigon de niaj mensoj. Ni faras el esp.o potencan kulturilon. Ni disetendas nian agadkampon ĝis la ekstremoj de Satanio. Unuvorte ni faras *pozitivan* laboron.

Sendube la profesiaj revoluciuloj daŭrigos ankoraŭ longe ne tre atenti pri internacia lingvo. Barakte ili klopodos ŝanĝi la socian ordon de supre per dekretoj kaj leĝoj, ofte neaplikeblaj. Ili ŝatos nin kiel fantaziulojn, kiuj misuzas sian energion...

Sed ni forte konsciu, ke kutimigante nin al eksternacia agado ni estas la plej certaj revoluciuloj, ĉar ni portas revolucion en niajn spiritojn; ĉar ni jam embrie funkciigas societeton kiel estas esperinde ke funkcios la tutmonda socio.

E. Lanty.

Ekriĝo al Sovjeta Rusio

Tie ĉi mi penas laŭ miaj povoj doni mallongan objektivecan priskribon de Sovjeta Rusio. Cetere, mi, kiel samtempulo, ne povas kaj ne intencas liveri tute objektivajn klarigojn de la revolucio. Ĝi estas tasko de venontaj senpartiaj historiistoj sen iaj tendencoj.

Kiam, en februaro 1917, la rusa popolo forigis la caron kun lia korteganaro, la potenco transiris al kapitalistoj. La nova registaro certe ne volis fini la militigon, kiu daŭris dispremadon nian landon. Tiam la maldekstra parto de l' rusa social-demokratia partio, nomita „bolŝevika“, komencis sian propagandon pri „profundigo de la revolucio“. Ĝia ĉefa signaldiro estis: paco, per kiu ĝi iom post iom altiris al si simpatian de la rusa popolo kaj armeo. Kaj jen, post multaj ribeloj en la centroj kaj en la provinco, okazis oktobra revolucio kaj bolŝevikoj estiĝis la regantoj. Ilia situacio estis tre malfacila kaj malforta: plena bojkoto flanke de la inteligentularo, foresto de ia ajn armeo, krom volontula „ruĝa gvardio“, formiĝinta precipe el laboristoj, ĉiufankaj minacoj de kapitalistaj ŝtatoj kaj kontraŭrevoluciaj landoj, konstantaj ribeloj interne — jen estas la bildo de l' unuaj tagoj de la Sovjeta Respubliko. La nova registaro sukcesis konservi la potencon nur en meza Rusio, kie troviĝis pligranda parto de rusa proletario. Sur la randoj ekaperis diversaj generaloj kun armeoj, ofte rekrutitaj perforte. Tiujn ĉi generalojn subtenis alilandaj registaroj por dispremi la embrion de sociala revolucio. Certe la nesperta ruĝa gvardio ne povis kontraŭstari la bone ekzercitajn kontraŭrevoluciajn armeojn. Sekve, post ioma plifortiĝo, la Sovjeta Registaro devis remobilizi la demobilizitan popolon. Eĉ plu: por povi kon-

traŭstari la atakantojn, la registaro devis streĉi ĉiujn siajn fortojn. La tuta lando estis deklarata „milita tendaro“. Kaj jen, anstataŭ paco ni vidas plej grandan militarismon. Vere tiu ĉi militarismo ne similas al ĉiuj antaŭaj — ĝi defendas la revolucion kaj ĝiajn akiraĵojn. El kio konsistas tiuj akiraĵoj? Kiel mi jam diris, komunistoj (kiel ili alinomiĝis anstataŭ „bolŝevikoj“) intencis „profundigi“ la revolucion, t. e. ne kontentiĝi per la forigo de l' caro, sed peni forigi ankaŭ la kapitalistan sistemon kaj fari socialan revolucion. Ili estis plene konvinkitaj, ke tia revolucio plej baldaŭ okazos en okcidenteŭropaj ŝtatoj. Mi memoras kun kia entuziasmo estis renkontataj la sciigoj pri la revolucio en Germanio kaj en Hungario. Plena de tiuj ĉi esperoj la registaro komencis prepari Ruslon al venonta komunismo, agante laŭ la principoj de *Karl Marx*. Estis proklamita la diktaturo de la proletario, ĉiuj burĝaj institucioj iom post iom forigataj kaj la lando kondukata al socialismo, unua ŝtupo al la idealo — komunismo. Oni opiniis, ke la efektivigo de socialismo tute ne estas tiom malproksima: eble ĝi venos post kvar aŭ kvin jaroj, maksimume post dek. Al kio alkondukis tia opinio ni tuj ekvidos, sed antaŭe mi volas montri la tiaman situacion de la lando.

Rusa popolo estis kaj estas tre malklera. En tio estas kulpaj la malfrua apero de Rusio sur historia scenejo kaj penoj de la estintaj regantoj teni la popolon en malklereco, por ke ĝi estu pli obeema. La proletario, pro ne larĝe disvastigita industrio, estas malmultnombra. Krom tio, pro la militigo kaj revolucio ĝi ankoraŭ pli malgrandiĝis: ja multaj kaj plej konsciaj laboristoj nun foriĝis de fabrikoj aŭ por regi la landon aŭ por defendi la revolucion. Urbanoj kaj intelektularo preskaŭ ĉiuj estis kontraŭ Sovjet-registaro. La pligranda parto de la rusa popolo: vilaĝanoj — komence estis revolucia elemento. Ili deziris ricevi teron de bienuloj, monakejoj ktp. Sed, ricevinte ĝin, ili tute ne deziris esti socialisme regataj. Kiam do la registaro komencis forpreni de ili preskaŭ senpage grenon, ili estiĝis eĉ kontraŭrevoluciuloj. Ni tiam ofte vidas vilaĝanajn ribelojn. Sekve de l' militigo kaj revolucio, rusa industrio kaj transporto estiĝis en tre malbona situacio. Fabrikoj ne laboris; fervojoj jam delonge ne ricevis novajn vagonojn, lokomotivojn; malnovajn oni ne riparis; mankis hejtaĵo, fabrikoj ktp. Tiaj estis la cirkonstancoj.

Nun mi rakontu pri la rimedoj, kiujn uzis komunistoj por atingi socialismon. Kiel mi jam diris, granda militarismo karakterizas la Sovjetan regadon. Ĝia influo estis sentata sur ĉiuj flankoj de la vivo. Unue: loĝantaro perdis ĉiujn rajtojn. Ne nur la rajtoj de libera presado, parolo aŭ kunvenoj mankas, sed homoj ne povis eĉ elveturi el sia urbo sen permeso (kiu estis ricevebla per multaj malfacilaj klopodadoj). Oni ne povis vendi, aĉeti panon kaj multajn aliajn produktaĵojn. Ĉiuj urbanoj estis devigataj labori en ŝtataj institucioj. Nur ŝtataj kaj komunistaj gazetoj aperis, kaj nur ŝtata eldonejo rajtis eldoni librojn. Sed eĉ tiuj libroj, same kiel leteroj, estis kaj estas ankoraŭ trarigardataj de „Milita Cenzuro.“ Oftaj ribeloj igis la registaron formi „Tutrusian Eksterordinaran Komisionon por lukto kontraŭ la Kontraŭrevolucio, intencata fuŝado kaj spekulacio“¹⁾. La komisiono havis filiojn

(1) Lastatempe ĝi estis likvidata kaj ĝiajn funkciojn prenas sur sin la novstarigitaj „Politodjeloj“ (Politikaj Fakoj).

en ĉiu gubernia urbo. Ĝi kaj ĝiaj filioj rajtis esplori krimojn kontraŭ la registaro kaj povis aresti kiujn ajn kaj puni la krimulojn ĝis morto inkluzive sen juĝo. Memkompreneble ĉiuj fabrikoj, entreprenoj, eĉ ofte malgrandaj, ankaŭ magazenoj estis forprenitaj de la antaŭaj posedantoj. La registaro prenis sur sin la taskon provizi la loĝantaron per ĉiuj produktaĵoj. La kooperacio estis la ilo de la ŝtato. Idealo estis: homoj donas sian laborkapablon kaj ĉion produktitan al la ŝtato, la lasta do donas al ĉiuj laborantoj ĉion necesan por la vivo. Sed kiom malproksime ni estis de tiu ĉi idealo! La registaro ne povis plenumi siajn taskojn. Ĝi estas komprenebla: pro ruiniĝo de l' industrio kaj transporto, pro severa blokado, la ŝtato terure malriĉiĝis. Restintan parton de pretaj fabrikoj oni devis konservi por la armeo, kiu postulis multe da manĝproduktoj. Tial oni devis forpreni, ofte perforte, de vilaĝanoj grenon, ne povante doni ion interesanĝe. Kompreneble ili penis ĉiel kaŝi ĝin. La kolektita tiamaniere pano apenaŭ sufiĉis por nutri la armeon kaj laboristaron, — aliaj do oficistoj kaj urbanoj ricevis aŭ nenion aŭ tre malgrandan kvanton. Sed la urbanoj ja ankaŭ bezonis manĝi. Rezultate: dismultigis koruptaĉetoj, priŝtelo de popola havaĵo, fine kaŝita spekulacio. Baldaŭ post la revolucio bojkotado de la intelegentulaĵo finiĝis, sed multaj „blankuloj“ kaŝe malhelpis al sovjeta laborado. Profitante la nespertecon de sovjetlaborantoj, diversaj friponoj enpenetris sovjetajn oficejojn kaj eĉ Komunistan Partion. Kun tiaj „laborantoj“ tre disvastiĝis burokratismo. Aperis multege da oficejoj. Pri ilia nombro oni povas juĝi, konsiderinte, ke malgraŭ ke ĉiuj devis ofici, ne sufiĉis oficistoj. Komune tiuj ĉi oficejoj formis tre pezan aparaton. Por akiri ian bagatelaĵon, ekz. paron da seruroj, vi devis perdi kelkajn tagojn kaj oni skribis al vi diversloke dudekon da paperoj! Senkonsciencaj urbanoj, kaj ankaŭ laboristoj, ne ricevante pagon, faris nenion en siaj laborejoj. Fininte sian ses aŭ ok horan „labor-tagon“ oni komencis ion allabori por manĝi: oficistoj spekulaciis, laboristoj faris iajn bagatelaĵojn por ŝanĝi ilin ĉe vilaĝanoj kontraŭ pano. Resume la rezultato estis: anstataŭ komunismo la tuta lando aspektis kiel granda kazerno. Interna vivo de pligranda parto de loĝantoj konsistis preskaŭ nur el akirado de panpeco. La spiritstato certe en tiaj kondiĉoj ne povis esti bona. La scienco, kiu en Rusio neniam estis altŝtupa tute malaltiĝis. Scienculoj kaj profesoroj ne tiom pensis pri sciencoj, kiom pri tio: kiamaniere ricevi pli multe da nutraĵoj. Nur politika vivo donis eblon aperigi siajn talentojn, sed per ĝi povis okupiĝi nur komunistoj.

Tiel ne povis longe daŭri. La *sperto montris, ke ne estas eble enigi komunismon aŭ socialismon „de supre“ per dekretoj, des pli en tia malklera lando kiel Rusio.* Povas esti, ke Sovjeta Registaro agante tiel faris grandan eraron. Post 3 jaroj evidentiĝis, ke estas neprudente atendi nun la tutmondan revolucion. Tia revolucio kredeble okazos ne pli frue, ol post unu el venontaj tutmondaj kapitalistaj militegoj. Tiel ankaŭ la esperoj je sociala revolucio ne povis pravigi tian politikon. Eĉ se ĉio starus bone, eĉ tiam socialista lando ne povus ekzisti inter kapitalistaj ŝtatoj: Klariĝis, ke agante pluen tiamaniere, Sovjeta Registaro mem preparas por si pereon. Tial komunistoj lastatempe ŝanĝis sian agadmanieron, por povi konservi en siaj manoj la po-

tencon. Aperis tiel nomata „nova ekonomia politiko“ (rusoj nomas ĝin mallongigite: „nepo“). Komercio estas permesata, privataj entreprenoj ktp. La ŝtato havas la intencon fariĝi mem ĉefa kapitalisto. Sed paralele kun ĝi reaperis novaj, pli malpli grandaj privataj kapitaluloj. Por ili nun servas lukzaj magazenoj, restoracioj kun karaj vinoj ktp. La registaro, akceptinte kapitalismon, akceptis ankaŭ firman buĝeton t. e. elspezoj laŭ ĝi ne devos superi la enspezojn. Ĝis nun Sovjeta registaro ekzistis precipe per presado de papermono, tiel ke tiu-ĉi lasta tute senvalorigis. Laŭ kurzo por marto unu antaŭmilita rublo valoras 200 000 sovjetajn rublojn. Ĉie montriĝas nun ŝparemo: oficejoj estas kunigataj aŭ likvidataj: En la restantaj oni maldungas oficistojn, ofte ĝis 25%. Oficistoj ricevas pli grandajn salajrojn. Tamen la situacio ne ankoraŭ estas bona, kaj la salajroj multe ne atingas la antaŭmilitajn.

„Nepo“ kreis multajn interesajn. Interalie komunist-komerciston. Jes, por konkuri kun privata merkato, komunistoj devas studi la komercajn rilatojn kaj mem komerci, certe nur je la nomo kaj per la ŝtato. Interesa estas ankaŭ rilato de alilandaj kapitalistoj. Unuflanke ili vidas la dekstrumiĝon de Sovjetio, kiu malfermas por ili larĝan merkaton, sed aliflanke tamen timas, kvankam dekstrumiĝintan, la komunistan registaron. Tial la tuta politiko de kapitalistaj ŝtatoj estas duobla: duonoficiala akcepto de Sovjeta Rusio kaj samtempe senĉesaj intrigoj kontraŭ ĝi.

Estas malfacile diri kion alportos „nepo“. La registaro, reforminte sian politikon, devas akcepti tiajn formojn, kiuj ebligas liberan komercadon en kaj eksterlande. Kian rolon ludos la ŝtato en la nova situacio? En plej malbona konjekto okazos, ke, unu belan matenon, komunistoj vekigis en tute kapitalista lando, kaj ĉiuj akiraĵoj de l' revolucio estos perditaj. En alia okazo la ŝtato konservos al si ĉefan rolon en enlanda industrio kaj komercio. Sed ĉu tiam la regantoj konservos en nemakulita pureco sian proletariecon kaj revolucion? Ĉu ne infektos ilin la abomena spirado de l' kapitalista monstro? Ni esperu, ke ne. Sed veran respondon povas doni nur tempo. Ni atendu.

Hermann Kononov

S. A. T.^a Monkolekto por la Rusaj malsatuloj

5^a listo de monoferantoj

Glodeau 10 fr.; Rousseau 5 fr.; Deleger 5 fr.; Tours'a Samidealanino 20 fr.; Lanty-Perfetti 40 fr.; Banmer 20 fr.; Kino Blanche Houyvet 20 fr. fr. = 120 fr. fr.

Je la 27 marto la monkolekto sumis: 450,80 fr. fr., 314 mkg., 350 mkp., 9 kr. ĉek.

Ĉar, de Petrograd ni ne ankoraŭ ricevis respondon al niaj jam de longe senditaj petinformoj pri la plej asekura vojo por transigi la monon Rusion, — kaj ĉar aliflanke urĝas helpi la malsatantojn, tial ni decidis uzi la servon de la „American Relief Administration“ pere de ĝia filio en Paris, 18 rue de Tilsitt.

La monkolekto sufiĉis por pagi 4 kestojn da nutraĵoj, kaj ĉiu kesto entenas: 50 funtojn da blanka faruno, 25 da rizo, 10 da lardo, 10 da sukero, 3 da teo, kaj 20 skatolojn da lakto.

Ni adresis 3 kestojn al: „Tutruslanda Esperantista Unuiĝo de Helpe al Malsatantoj“, Italjanskaja 31, Petrograd kaj 1 keston al: K^{do} l. Grafov, Telegraf Clerk, Arkadak (Saratov Gub.)

Ni petas la adresatojn atesti al ni pri la ricevo de la sendaĵoj, kaj sciigi pri ties uzado.

S. A. T.

Edukado de la Laboristoj¹⁾

lama verkisto angla, *Herbert Spencer*, tiel difinis edukadon: *preparado por korapleta vivado*. Ĉar en la ŝtataj lernejoj kaj en la teknikaj kolegioj kaj universitatoj la laboristoj ne povas ricevi tian edukadon, ili devas trovi ĝin ekstere en sendependaj lernejoj.

Ĉiutage la infanoj lernas la ŝovinistan historion; iliaj mensoj difektigas pro la stultigaj instrumentoj. Rigardataj kiel estontajn salajrosklavojn ili lernas nur sufiĉe por ke la kapitalistaj ĵurnaloj regu ilian pensadon kaj ke ili konduku sufiĉe inteligente en la laborejo.

Per la teknika studado nuna la profitodevenoj estas pliarĝigataj. Elpensoj kaj plibonigoj ĉiaj nur alpreniĝis ĉar la kapitalistoj volas pli sukcese profiti kaj konkuri. Per la ekzisto de multaj menslaboristoj ilia prezo malaltiĝas. Nek en la ordinara lernejoj nek en la teknikaj kolegioj la laboristoj povas trovi la liberigan helpon.

Kredante ke ili devas agi sendepende en industria kaj politikaj aferoj la laboristoj decidis starigi sian propran edukadon. En la *Laborista Kolegio en Londono* loĝas kaj studas 40 studentoj dum 2 jaroj. Poste ili revenas en laborejojn kaj disdonas sian klarecon inter siaj kunlaborantoj. En multaj urboj kaj vilaĝoj estas grupoj de maturaĝaj studentoj. La Kolegio mem estas oficiale subtenata de la fervojistaj sindikatoj kaj de la karbministoj de Suda Kimrio. Nun la klasoj en la diversaj partoj de Britio starigis la *Nacian Konsilantaron de la Laboristaj Kolegioj*. La "*Plebs*" *Ligo* propagandas la ideon inter la aliaj sindikatoj kaj helpas starigi ĉie klasojn.

La ĉefaj temoj konsistas el ekonomio, socia historio kaj evoluado de la laborista movado. En ekonomio la studentoj elkovras la realan devenon de „plivaloriĝo“, la tendencojn de la nuna socio, leĝojn de salajroj, influon de la trustoj k. t. p. uzante kiel bazon la verkon de *Marx*.

Komprenible la falsaj ideoj de la ortodoksaj lernejoj detruigas en la prihistoria lernado. La kresko de produkt-povo konvinkas, ke malriĉeco nun ne rajtas ekzisti. La alveno de kapitalismo, la lasta ero en la socia ĉeno, kompreniĝas kaj ankaŭ ĝia venonta foriro. Simpatie kaj zorge la studento studas la antaŭajn baraktojn kaj organizaĵojn de la laborista klaso kaj lernas el iliaj penoj kaj eraroj. Iel starigas vartejo de batalantoj, kiuj vivigos la sekajn ostojn en la sindikatoj. Ne edukado por edukado mem sed por detruigi salajrosklavecon. Kompreninte klasbaraktojn estintajn, la studento fariĝos soldato en la nuna armeo laborista. Tia edukado estas la vere daŭra fermentilo.


Krom historio kaj ekonomio la klasoj studas la filozofion de *Dietzen*, kiu plenigis la teoriojn de *Marx* en la filozofia kampo. Ankaŭ psikologio kaj ekonomia geografio ricevas atenton.

Estas inter aliaj esp-a klaso ĉe la kolegio. Eksteraj studentoj ankaŭ havas tie klasojn.

Proksimume estas 15000 studentoj en tiu ĉi eduka movado. Ni semas kaj semas, kaj jam aperas la rikolto.

Mark Star

(1) Kredeble S. A. T.-anoj ŝatos ricevi sciigojn pri edukada movado brita inter laboristoj, kies gazeto „Plebs“ enhavas regule esp-an rubrikon. La verkinto tre deziras esti informata pri similaj aferoj en aliaj landoj. — M. S.



Panoramo de la urbo

2^a Kongreso de S. A. T.

Frankfurt a. Main (Germanio)

12—16 aŭgusto 1922

4^a Komuniko

Kongres-Komitato: Prezidanto, K^{do}. Jean Roth, Rodelheimer Landstr. 131 III, Frankfurt a. M.-Rodelh. (Germ.).

Kongres-Kotizo. Anglio, 3 ŝil. — Aŭstrio, 100 kr. — Belgio kaj Francio, 7 fr. — Bulgario kaj Rumanio, 20 lev. — Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 20 kr. — Danio, Norvegio kaj Svedio, 3 1/2 kr. — Germanio kaj Finnlando, 20 mk. — Hispanio, 4 pes. — Hungario, 50 kr. — Italio, 9 lir. — Nederlando, 2 guld. — Polio 200 mk. — Svisio, 3,50 fr. sv. — Usono, 80 cend.

Pago: Per naciaj monbiletoj aŭ ĉeko en registrita letero adresota al kasisto: K^{do} Rudolf Mayer, Rodelheimer Landstrasse 24 II, Frankfurt a. Main. La ĉekoj estu prefere negoceblaj (ŝanĝeblaj) ĉe la „Frankfurter Sparkasse“ — La germanianoj ĝiru sian kotizon al poŝtĉek-konto N^o 50280, Frankfurt.

Eldonaĵoj. La kongreskomitato eldonis serion da 10 belegaj poŝtkartoj diverskoloraj kun teksto reklama pri la Kongreso: havebla ĉe K^{do} Leo Kempinski, librejo, Kronprinzstr. 17, Frankfurt a. M., interŝanĝe de 3 respondkuponoj (aŭ 10 Mkg. por germanianoj).

Jen novaĵo kiun, certe kun ĝojo, ekscios la Satanaro: la nobla sennaciulo *Romain Rolland* „honore“ prezidos nian duan Kongreson. Ja, responde al peto de nia K^{do} Lanty, li skribis leteron el kies enhavo ni citas la jenan frazon «Mia farto estas tro ŝancela por ke mi aŭdacu partopreni kongresojn, kaj do mi ne povos ĉeesti vian...», tamen, se sufiĉas meti mian nomon apud viajn, mi cedas volonte, kaj dankas al vi pro via amika intenco...». Plie, li promesis verki specialan manifeston por la Kongreso.

Ni jam ĝuis plezuron publikigi (en „Esperantista Laboristo“) varmajn kuraĝigojn pri nia agado, de *Romain Rolland*. Nedubleble tiu nova atesto simpatia de tia homo, mondfame konata, tre plifortigos la brilecon de nia 2^a.

Dua listo de aliĝoj ricevitaĝis ĝis la 15^a marto:

- K^{doj} Messmer, Anton, Jourdanstrasse 47, Frankfurt-West,
 „ Heck, Franz, Rodelheimer Landstrasse 113, Frankfurt-Rodelheim,
 „ Manske, Hans, Breite Strasse 4, Berlin-Schmargendorf,
 „ Muribo, Martin, Bekkelagskögda, Kristiania (Norv.),
 „ Haschke, Emil, Kronprinzenstr. 11 IV, Breslau,
 „ Deiters, Frederiko, Schillerstr. 29 Hh. II, Cassel,
 „ Ort, George, Wolfsangerstrasse 5, Cassel,
 „ Gogoline, Ferdinand, Müllergasse 20 IV, Cassel,
 „ Roth, Rudolf, Ihringshauserstr. 1 IV, Cassel,
 „ Decker, Wilhelm, Friedrichstr. 19, Cassel-Sandersh.

*

Ĉar la vivkosto en Germanio konstante ŝanĝiĝas, ni preferas atendi ĝis venonta komuniko por citi plej proksimumajn ciferojn pri la kosto de la restado (loĝo kaj manĝo) en Frankfurt. Tamen, ni certigas ke, pro la granda kurzdiferenco, la tiea restado estos tre malkara por la skandinavoĵoj kaj okcident-eŭropanoj; por la kongresanoj kies valuto estas malsupre la germ.marko, ni klopodos trovi privatan loĝejon kaj malkaran (kvankam rekomendindan) restoracion, tio por pleje kompensi la malgajnon de la monŝanĝo.

Same ni prokrastis la publikigon de la hortabelo de la vagonaroj de, kaj al diversaj urboj eŭropaj, ĉar tiu tabelo estas modifota la 1-majo.

*

Krom la priasociaj, oficialaj aferoj, la K.-K. enmetis en la programo diversajn diskut-temojn kiuj certe interesos la kongresanaron, i. a. pri "Organizado de la Teknikistoj" kaj pri „Ĵurnalist-arto!" La K.-K. estos dankema al K^{doj} kiuj akceptos referati pri tiuj temoj, aŭ pri aliaj de ili elektitaj.

La K.-K. aranĝos imponan manifestacion internacian antaŭ la memorig-monumento: "la militviktimoj". Tiun pilgrimon partoprenos ĉiuj proletariaj organizaĵoj de Frankfurt.

London, 15-aŭgusto vespere, okazos granda propagandamitingo. La K^{doj} kiuj kapablas paroli esperantlingve ĉe tiuj manifestacioj sciigu antaŭe la K.-K.

*

Ni konas multajn S. A. T.anojn partoprenontajn certe la Kongreson, kiuj ne ankoraŭ sendis sian aliĝilon. Ni insiste petas ilin sendi ĝin senprokraste, ĉar ju pli frue ni scios la kvanton (proks.) de la kongresanoj, despli bone ni povos plenumi ilian deziron.

Kompreneble kiuj, pro malfavoraj cirkonstancoj, ne povos veturi Frankfurton, tiuj povas aliĝi kiel subtenanta kongresano.

*

Lasta konsilo: skribu legeble vian adreson, — kaj ne postulu longan respondon de la Kongres-Komitato jam tre ŝarĝita.

Jean Roth
 prezidanto de la K.-K.

El Britio

La nuntempa ĉefa demando politika estas: Ĉu Lloyd George eksiĝos? Ŝajnas ke la Koalicio krevas. La malprogresemaĵoj ribelas pro la partopreno en Ĝenova Konferenco; ne sufiĉas ke ili honte kaj sukcese kontraŭis la alvokon de *Nansen* por la malsatantaj rusaj infanoj. La reakciuloj ankaŭ volas detrui la kontrakton kun Irlando. Sed la dividoj inter la parlamentaj estroj ne gravas por la laboristaro; ili cetere kuneagas en la atako kontraŭ la laboristoj.

Se estus ĝenerala balotado la *Laborista Partio* (nun enhavanta 71 Parlamentanojn) pligrandiĝos. Bedaŭrinde «reformismo» ĉe la estroj kaj nescio ĉe la laboristoj malfortigas la defendon.

Progresas la kapitalista atako kontraŭ la laboristaro brita. De la 17a Marto daŭras granda «lokaŭto» en la maŝinfabrikejoj. La «Amalgamated Engineering Union» (la sindikato de la maŝinfaristoj) rifuzis konsenti, ke la mastroj laŭvole povu enkonduki «overtime» (t. e., pluj laborhoroj ekster la kutima labortago). Tiu-ĉi sindikato jam porpagis multe da mono subtenante la anojn senlaborajn, kaj kompreneble plua laboro por la laborantoj malhelpas en ilia peno por trovi okupon.

«Ni fariĝu mastroj en nia propra domo» laŭte proklamis la mastroj. Ili intencas detrui la regon de la laboristoj en la regulo de ne nur la daŭro de la labortago, sed ankaŭ de ĉiaj procedoj kaj kondiĉoj en la laborejo.

Ĉar ili rifuzis akcepti salajron malaltigitan ĝis 26 ŝilingoj 6 pence ĉiusemajne, la ŝipkonstruistoj ankaŭ estas nun «lokaŭtitaj». En la venonta semajno entute tiuj ĉi suferantoj nombros je 1¹/₂ miliono. Laŭ la oficialaj ciferoj preskaŭ 2 milionoj ankoraŭ ne ricevas laboron. Gaja hejmo de kapitalismo.

Mark Star

Por disvastigi Esperanton meze de la laboristaro

D^{ro} Carbone en Januaro n^o de S. R. prave kaj ĝustatempe elmetas la demandon pri la disvigo de esp.o meze de la Laboristaro.

Por akiri tiun lingvon en preciza kompreno, la kleruloj eĉ tute ne bezonas kurson aŭ ĉeeston en Esperantio; al tiuj sufiĉas sole bona lernlibro kun vortaro.

Nu, tia penso ja puŝis nian Majstron malbezoniĝi ĉion necesan al naturaj lingvoj: instruistojn, medion k. t. p.

Estas vere, ke malkleraj laboristoj, ĉeestintaj en alinacia medio lernas fremdan lingvon, sendemandi pri ĝia gramatiko, eĉ senrimarki tiun "mankon".

Tamen, spertiĝinte pri tio, mi asertas, ke la genie premeditata kaj plej simetrie kunmetita esp.o estas tre facile lernebla kun instruisto kaj memorebla de malkleraj laboristoj.

Oftokaze la subsigninto spertis tion, gvidante 3 sinsekvajn kursojn dum 1907—1909, ĉeestintajn de malkleraj kaj malspritaĵaj vilaĝanoj, arbaraj laboristoj. Jam de longe ili pli bone skribas kaj parolas esperante ol en sia gepatra lingvo. La kursgvidinto tamen ne estis tiutempe pli klera ol siaj lernantoj. Pli posta rezulto estis, ke tiu "malklerulo" fariĝis priesperanta instruanto al instruistoj.

Ni do ne malesperu, sed pacience kaj persisteme instruu niajn kamaradojn!

Petr Toškov (Bulgario).

Se vi intencas partopreni la 2^{an} Kongreson de SAT. sendu senprokraste vian aliĝilon

La 1^{an} de Majo de la 50^a Jaro

(Songô)

de LEON KOBRIN

Kaj tio estis en la unua tago de la monato Majo, en jaro mil naŭcent kaj . . . en la tempo de l' reĝo *Kapitalo*, kiu regis kun krueleco super la tuta mondo . . .

Kaj en songô mi ekvidis mirinde belan virin-figuron . . . Kaj mi kun mirego levis miajn okulojn al ŝi. Sur ŝia blanka alabastro-vizaĝo lume brilis la feliĉo, el ŝiaj okuloj elrigardis la klara, blua, bela ĉielo; ŝia longa ora hararo, kiu estis disŝutita sur ŝia delikata kaj ronda dorso, estis plektita per belaj florkronoj de ruĝaj kaj blankaj floroj kaj ŝia tute grandega kaj fleksebla figuro spiris la malvarmetan frescon de maljuna, densa arbaro kaj la sanecon de la pura naturo. . .

Kaj ŝi diris al mi tiele:

— Leviĝu, homido, kaj iru kun mi! . . .

Kaj mi ŝin demandis per tremanta voĉo:

— Kiu vi estas, vi belega virin-filino? . . . Sur via vizaĝo estas disverŝata ĉiela feliĉo, en viaj okuloj banas sin printemp-sunoj kaj vi entute ne aspektas kiel ido de nia pekema tero, — ho, diru al mi: kiu vi estas? kaj kien vi vokas min? . . .

Kaj ŝi respondis al mi tiele:

— Mi estas *Estonto* . . . homido, mi volas vin preni kun mi, por al vi montri, kiel oni festas ĉe mi la hodiaŭan tagon. . . Iru! . . . Kaj apenaŭ mi rekonsciiĝis pro la granda konsterniĝo, mi jam flugis kun ŝi en la malproksiman, malproksiman interspacon. . .

Kaj ni flugis, kaj flugis en la aero; la tero sub ni fariĝis pli kaj pli malgranda, la maro ŝajnis kvazaŭ speguleto, kaj la ora suno gaje ridetis kontraŭ nin. . . Kaj tiam ni komencis pli kaj pli malsuprenflugi, kaj antaŭ niaj okuloj ekkreskis nigra arbaro sur alta monto; la arboj lumadis per siaj branĉoj, ĉirkaŭkreskitaj per freŝaj, verdaj folioj, kvazaŭ ili salutas nin. . . Kaj sub monto estis disetendita vasta, vasta verda valo kun malaltaj konstruaĵoj de mirinde bela arkitekturo, kaj super la konstruaĵoj moviĝis ruĝaj-skarlatruĝaj standardoj, en kiuj sin respogulis la lumaj radioj de la suno. . .

Kaj subite mi ekaŭdis la voĉon de Estonto kaj ĝi diris tiele:

— Stariĝu sur viajn piedojn, homido, iru al viaj fratoj kaj fratinoj kaj festu kun ili la hodiaŭan festo-tagon. . .

Kaj tiam mi demandis:

— Kaj vi, bela Estonto, kaj vi, kien vi iros?

Kaj ŝi ekridetis kaj respondis jene:

— Homido, mia nomo estas „Estonto“ en via lando, sed tie-ĉi mi jam ne estas Estonto, sed „Estanto“. . . Nun mi devas iri for post tiujn altajn montojn, ĉu vi vidas? . . . Post tiujn-ĉi montojn, kies suproj brilas en la ora suno. . . Tie mi preparis por la homidoj de tiu lando novajn fontojn de feliĉo, de kiuj ili ankoraŭ nun ne scias, sed de kiuj ili ekscios siatempe. . . Tiam ili komencos serĉi tiujn novajn fontojn, kaj mi montriĝos antaŭ ili. . .

Kaj mi ree ŝin demandis:

— Vi eterne bela Estonto, kaj kio estos post tio, kiam vi donos al ili tiujn novajn fontojn? . . .

Kaj ŝi respondis tiele:

— Homido, kiel la mondo estas profunda kaj granda, tiel profunda estas la spirito de la homo kaj tiel granda estas lia deziro al feliĉo . . . kaj li deziras ĉiam, ĉiam, ĉiam, ĝis kiam li vivos, kaj li vivos eterne, eterne, eterne, ĝis kiam la mondo ekzistos. . . Kaj tion dirinte, Estonto malaperis post la altajn montojn, kiel luma, brilanta radio. . .

Kaj tiam mi levis miajn okulojn kaj ĉirkaŭrigardis: kaj la ĉielo estis blua, kaj la suno verŝis siajn orajn radiojn tra montojn kaj valojn, sur verdan herbon, sur la majan verdan herbon, sur la liberajn kaj baritajn ĝardenojn, en kiuj floris arboj kaj diverskoloraj floroj, kaj sur la belajn konstruaĵojn kun silkaj standardoj. . . Kaj la aero estis freŝa, pura, viviga kaj oni spiris tiel libere kaj agrable. . . Kaj jen subite komencis de ie alflugi belaj, dolĉaj, gajaj sonoj de muziko, kunmiksitaj kun la kanto de homaj voĉoj. Kaj mi sekvis la sonojn. . .

Kaj antaŭ miaj okuloj tuj prezentiĝis mirinda bildo: granda, grandega amaso da homoj en verdaj vestoj, kiel herbo, kun ruĝaj floroj sur la brustoj kaj ruĝaj standardoj en la manoj marŝis en unu vico, kantante kaj ludante. . . Fronte veturis en verda veturilo, jungita per blankaj ĉevaloj, maljuna viro, kun blanka barbo, kiel lino, tenante en la manoj ruĝan standardon. . . Kaj mi iris al verdvestita homo kaj demandis:

— Kien vi ĉiuj marŝas? kaj kia festo-tago estas hodiaŭ? . . .

Kaj subite mi restis senmova pro miro; tiu, kiun mi demandis, ne estis viro, sed virino. Mi tion ekrimarkis laŭ la riĉaj formoj de ŝia fleksebla korpo, kaj laŭ la gracia, delikata esprimo de ŝia freŝa, floranta vizaĝo. . . Kaj ŝi respondis al mi iom mirigita per jenaj vortoj:

— Kien? Vi ne scias frato? Hodiaŭ ja estas nia plej granda festotago! Hodiaŭ estas la unua de Majo de la kvindeka jaro. . . Kiel la naturo festas en tiu monato sian feston, tiel ni festas hodiaŭ la festotagon de nia liberiĝo jam de kvindek jaroj, de la fino de la Sociala-revolucio. . . Ni marŝiras en nian templon por aŭdi la historion de sklaveco kaj liberiĝo el la buŝo de nia porliberec-batalintulo, kiu postvivis tion. . . Jen la maljuna bon-frato nia, kun la neĝ-blanka barbo, kiu veturas en la veturilo. . .

Kaj mi ekvidis, kiel ĉe alta bela templo kun glatigitaj fenestroj en kiuj sin spogulis la suno, oni eligis la maljunulon el la veturilo kaj kondukante lin helptenata sub la brakoj en la templon, la amaso salutis lin per ĝoj-krioj: „Vivu la 1^a de Majo“, „Vivu nia granda festo-tago!“ . . .

Kaj la templo estis ornamita per floroj kaj sur la muroj pendis, ĉirkaŭitaj per verdaj florkronoj, portretoj de *Marx*, *Engels*, *Lasalle*, *Bakunin*, kaj ankoraŭ de multaj aliaj de mi nekonataj. . .

La amaso ĝojegis, la muziko ludis. . .

Kaj jen subite silentiĝis. La maljunulo kun la blanka barbo aperis antaŭ la amaso. En la okuloj brilis larmoj, la vizaĝo radiis pro profunda, interna ĝojo, la lipoj tremis; kaj tiam li levis la manojn supren kaj komencis rakonti. . .

Kaj li rakontis pri malsato, malvarmo, kaj soifo, pri suferoj, mizeroj kaj doloroj. . . Kaj li rakontis pri vivo

sen vivo, pri aero sen aero, pri mallumaj tomboj por vivantoj, kaj pri mortintoj, kiuj ne povis akiri tombon. Kaj li rakontis longan, longan historion pri malĝojo, malfeliĉo, pereoj kaj turmentoj...

Kaj fine li rakontis, kiel liaj kamaradoj falis en la lasta batalo por la libereco... „Ili estis bravaj kamaradoj! En iliaj koroj brulis la sankta fajrero de libereco; per sia varmega sango ili forigis la malnovan barbaran sistemon de la socio kaj fruktigis la teron por vi, miaj infanoj!... Do ni honoru ilian sanktan rememoron per ilia batalmarŝo, per la „Internaciano!“ Vivu la sankta rememoro! Vivu la libereco! Vivu la 1^a de Majo!“

Kaj tuj eksonis la sonoj de la „Internaciano“ kunmiksita kun la entuziasmaj ekkrioj:

„Vivu la libereco!“ „Vivu la 1^a de Majo!“ ...

Kaj mi vekigis.

Tradukita el juda lingvo de I. Jurysta.



Alegorio

Viro, armita de ĉasponardego, kurante preterpasas Sokraton. Li persekutas alian viron, kiu rapidege forkuras.

— Haltigu lin! Haltigu lin!

La majstro de Plato ne moviĝas.

— Ĉu vi estas surda? Kial do vi ne baris la vojon al tiu mortiginto?

— Mortiginto! Kion vi volas diri per tiu vorto?

— Stranga demando. Mortiginto estas homo kiu mortigis

— Nu! ĉu buĉisto?

— Frenzulo. Temas pri homo kiu mortigis alian homon.

— Ah jes! Soldaton vi volas nomi.

— Malklerulo. Temas pri homo kiu mortigis homon dum nemilita tempo.

— Mi komprenas. Ĝi estas la ekzekutisto!

Dio ne ankoraŭ ekzistas, sed eble iam ĝi ekzistos.

RENAN

*

Preĝante Dion, fine oni ĝin kreas.

*

Ekzistas en la mondo nur unu sola heroeco: ĝi estas vidi la mondon tian, kia ĝi estas, — kaj ĝin ami.

ROMAIN ROLLAND

Unu el la Regoi de Respubliko

De MAKSIM GORKIJ

... Ŝtalo, petrolo, kaj aliaj reĝoj de Usono ĉiam fantomis tra mia spirito. La homojn, kiuj posedas tiel multe, mi ne povis al mi prezenti kiel ordinarajn homojn.

Al mi ŝajnis, ke ĉiu el ili havas ne malpli ol tri stomakojn kaj cent tridek dentojn en la buŝo. Mi estis certa, ke milionulo ĉiutage, de la 6^a matene ĝis la 12^a nokte, la tutan tempon, sen ripozo, manĝadis plej karajn manĝaĵojn: anserojn, meleagrinojn, porkidojn, rafanetojn kun butero, pudingojn, kukaĵojn kaj aliajn bongustaĵojn.

Vespere li estas tiom laciĝinta pro la ega makzellaboro, ke li ordonas al nigruloj maĉi, kaj mem jam nur englutas.

Fine li tute perdas energion kaj ŝvitante, malfacile spirante, estas de nigruloj forportata al lito. Kaj matene de la 6^a li ree komencas sian vivon turmentoplenan.

Tamen, eĉ tiu streĉado de l'fortoj ne donos al li eblecon formangi duonon el la rento de lia l'kapitalo. Komprenoble, tia vivado estas malfacila. Sed kion fari? Kia senco estus en la stato de milionulo, se li ne povas manĝi pli ol ordinara homo?

Al mi ŝajnis, ke li devas sin vesti ne per tolaĵo, sed per ŝtofo el oro; la kalkanumoj de liaj botoj estas fortikigitaj per oraj najloj, kaj sur la kapo, anstataŭ ĉapelo, estas io farita el brilantoj, lia surtuto estas garniturita per plej kara veluro, havas longecon ne malpli ol kvindek futojn, kaj estas ornamita de oraj butonoj, kies nombro estas ne malpli ol tricent. Dum festotagoj, li vestas sin samtempe per ok surtutoj, kaj ses pantalonoj. Komprenoble, tio ĉi estas ne oportuna, tio ĝenas, ... sed, estante tiel riĉa, oni ne povas ja vesti sin kiel ĉiuj ...

Poŝon de milionulo mi imagis kiel kavon, kien facile oni povas kaŝi preĝejon, parlamentdomon. Tamen, konsiderante la vastecon de la ventro de tia ulo, ventro simila al provizejo de bona mara vaporŝipo, mi ne povis imagi la longecon de la piedoj, kaj de la pantalonoj de tiu estaĵo. Kaj mi pensis ke la litokovrilo sub kiu ĝi (la estaĵo) dormas, devas esti ampleksa ne malpli ol kvadrata mejlo. Kaj se li maĉas tabakon, tiu estas komprenoble plej bona, kaj kiel kvanto *du funtojn pofoje*. Kaj se li ĝin fumas, do ne malpli ol unu funton por unu porcio. Mono postulas ke oni elspezu ĝin ... La fingroj de liaj manoj posedas mirindan, septecan kaj sorĉantan forton, kaj la econ: povi longiĝi laŭdezire. Se li, sidanta en New-York, eksentos, ke ie en Siberujo estas prenebla dolaro, li etendas la manon trans Berungo estas markolo kaj, ne ŝanĝante je loko forŝiras la multamatan objekton.

Strange estas, ke kune kun ĉio-ĉi mi ne povis imagi, kian vidkapablon havas la kapo de l' monstro. Mi eĉ preferis pensi, ke kapo estas tute superflua ĉe tiu ĉi amaso da muskoloj, ostoj, en kiu nur vivas viglega deziro elpreni el ĉio oron. Entute, en mia spirito, milionulo ne havis finitan formon. Kelkvorte, ĝi ĉefe konsistis, laŭ mi, el flekseblaj manoj kaj brakoj. Ĝi ĉirkaŭprenis la tutan terglobon, portante ĉion al granda malluma buŝego, kaj tiu ĉi buŝego suĉas, mordetas kaj maĉas nian planedon, verŝante sur ĝin avide salivon kiel sur varman, bakitan terpomon ... ĉu vi povas imagi mian miregon, kiam mi, renkontante unuafoje milionulon, ekvidis ke tio estas plej ordinara homo? Antaŭ mi sidis en profunda apogseĝo longa, malgrasa maljunulo, havanta ventron de normala amplekso, brunetajn, sulkiĝintajn manojn de ordinara homa grandeco. La velka haŭto de lia vizaĝo estis zorgeme razita, la pendanta

lipo malsupra malkovris bone faritajn makzelojn, ili (la makzeloj) estis plenigitaj per oraj dentoj. Supra lipo razita, sanga kaj maldika, bone alpremiĝis al lia maĉa maŝineto; kiam la maljunulo parolis, ĝi (la lipo) preskaŭ ne moviĝis. Liaj senkoloraj okuloj ne havis brovojn, la malbela kranio estis senhara. Ŝajnis, ke al tiu ĉi vizaĝo iomete mankis da haŭto kaj tuta ĝi (la vizaĝo) ruĝeta, senmova kaj glata similis vizaĝon de nove naskita infano. Estis malfacile difini ĉu komencas tiu ĉi estaĵo sian vivon, aŭ jam li aliris ĝis fino . . .

Li ankaŭ estis vestita kiel simpla homo. Ringo, poŝhorloĝo kaj dentoj jen estis la tuta oro kiu estis sur li, ĉiom pesis verŝajne malpli ol duon-funto. Entute, ĉi tiu homo estis simila je maljuna lakeo de aristokrata domo el Eŭropo.

La meblaro de l'ĉambro, en kiu li estis akceptanta min, ne mirigis pro lukso, ne ravigis pro beleco. La meblaro estis fortika, jen ĉio, kion oni povas diri pri ĝi.

Verŝajne en ĉi tiu domo iam eniros elefantoj. Jen kiun penson naskis la meblaro.

— Ĉu vi estas milionulo? demandis mi, ne kredante miajn okulojn.

. . . Ho jes, respondis li, konvinke balancante la kapon. Mi faris signon ke mi lin kredas kaj decidis tuj demandi lin pri ĉio.

. . . Kiom da viando vi povas manĝi dum matenmanĝo? mi demandis al li.

— Mi ne manĝas viandon respondis li, nur peceton da oranĝo, ovon, malgrandan tason da teo, jen ĉio.

Liaj senkulpaj okuloj de infano iomete brilis, kvazaŭ du grandaj gutoj da malklara akvo kaj mi ne trovis en ili (en la okuloj) eĉ unu eron da mensogo.

— Bone! diris mi, iom konfuzite. Sed estu sincera, diru al mi malkaŝe kiom da fojoj en unu tago vi manĝas?

— Du! trankvile li respondis, maten-kaj tagmanĝo, tio ĉi tute sufiĉas por mi. Por tagmanĝo: teleron da supo, blankan viandon kaj ion dolĉan, fruktojn, tason da kafo, cigaron.

Mia mirego pligrandiĝis kvazaŭ kukurbo (Estas konate ke kukurbo tre rapide kreskas, tial oni diras ke mirego pligrandiĝis kvazaŭ kukurbo, t. e. tre rapide). Li rigardis min per okuloj de sanktulo. Mi ekspiris kaj diris:

— Sed se ĉi tio estas la vero — kion do vi faras per via mono? Tiam li iomete levis la ŝultrojn, siaj okuloj moviĝetis kaj li respondis:

— Mi faras per mia mono ankoraŭ monon.

— Por kio?

— Por fari ankoraŭ monon . . .

— Por kio? ripetis mi la demandon. Li klinis sin al mi, apogante sin per kubutoj sur flanktenilo del' seĝo kaj kun tono de sciemo en la voĉo, li demandis:

— Ĉu vi estas frenezulo?

Kaj vi? respondis mi.

La maljunulo klinis la kapon kaj tra la oro de l'dentoj li direktis. — Interesinda homo. Mi verŝajne, unuan fojon vidas tian. Post ĉi tio li levis la kapon kaj larĝigis la buŝon vaste ĝis la oreloj kaj komencis silente observi min. Laŭ la trankvileco de lia vizaĝo li evidente opiniis, ke li estas tute normala homo; sur lia kravato mi rimarkis pinglon kun malgranda brilanto. Se tiu ĉi brilanto havus grandecon de kalkanumo, mi tiam komprenus ion.

— Per kio do vi vin okupas? demandis mi.

— Mi faras monon, mallonge diris li, levante la ŝultrojn.

— Fabrikisto de falsa mono? — kun ĝojo mi ekkriis.

Ŝajnas al mi, ke mi alproksimiĝas al malfermo de mistero. Sed tuj li komencis mallaŭte singulti, tuta lia

korpo tremadis, kvazaŭ ne videbla mano tiklis lin sub la brakoj. Liaj okuloj ofte palpebrumis.

— Ĉi tio estas gajiga! li diris, per kontenta rigardo. Ĉu vi volas fari pluajn demandojn? demandu ankoraŭ ion, li proponis kaj iacele plenvlovis la vangojn. Mi iom pripensis kaj insiste demandis al li . . . Kiamaniere vi faras monon?

— Ha! mi komprenas li diris kapklinante.

Tio estas simpla afero. Mi posedas fervojojn. La farmistoj faras produktojn, kaj mi liveras ilin al vendejoj. Oni devas prikalkuli kiom da mono devas esti lasata al farmisto por ke li ne mortu pro malsato kaj povu plu labori; la tutan superfluaĵon oni prenas al si. Tre simpla.

— Ĉu la farmistoj estas kontentaj pri tio?

— Ne ĉiuj mi kredas! li diris kun infana simplanimeco. Oni diras ke neniu iam povas esti kontenta. Ĉiam sin montras stranguloj kiuj ĉiam grumblas.

— Ĉu la registaro ne malhelpas vin mi modeste demandis.

— Registaro? li ripetis kaj iom enpensigis frotante la fingrojn. Poste, kvazaŭ ion ekmemorinte, li kapjesigis. Ha . . . tio estas tiuj . . . en Washington? Ne, ili ne malhelpas. Ĉi tiuj estas bonegaj buboj . . . Inter ili troviĝas kelkaj el mia klubo, sed oni malofte ilin renkontas . . . Tial iafaje oni forgesas ilin.

Ne ili ne malhelpas, li ripetis, kaj tuj sciivoleme demandis:

— Ĉu estas ie registaro kiu malhelpas al homoj fari monon?

Mi konfuziĝis pro lia saĝeco kaj mia naiveco. Ne, mallaŭte mi diris, mi ne parolas pri tio. Nu, ĉu vi komprenas, mi kredis, ke iafaje registaro devas malpermesi evidentan rabon? . . .

— Ne li kontraŭdiris. Tio estas idealismo. Ĉi tie ĝi ne estas kutimo. Registaro ne rajtas sin enmiksi en privata afero. . . Mia modesteco pligrandiĝis antaŭ tiu ĉi infana saĝeco.

Ĉu ruinigo al multaj homoj, farata de unu estas privata afero? mi ĝentile informiĝis.

— Ruinigo? li ripetis, ege malfermante la okulojn. Ruinigo okazas dum alta laborprezo. Kaj kiam okazas strikoj. Sed, ĉe ni loĝas enmigrintoj. Ili amasiĝas en la lando sufiĉe nombro por premi la prezon de la laboro — tio ĉi estas bona. Iom li reviviĝis kaj fariĝis malpli simila al maljunulo kaj infano, kunmiksitaj en unu persono.

Liaj maldikaj kaj brunaj fingroj rapide ekmoviĝis kaj lia voĉo pli rapide sonis en miaj oreloj:

— Registaro? Tio, se vi deziras, estas interesa demando, jes. Bona registaro necesas ekzemple por zorgi, ke la lando enhavu tiom da popolo, kiom mi bezonas por ke mi povu vendi ĉion, kion mi volas vendi. Kaj tiom da laboristoj devas esti, ke mi ne bezonas pluajn — eĉ unu ne devas esti superflua. Tiam ne povas esti socialistoj. Ankaŭ ne strikoj. Registaro ne devas preni altajn impostojn. Ĉiom, deprenebla al popolo — mi mem prenos. Jen estas laŭ mia opinio bona registaro. Mi bezonas, li daŭrigis per memfida, firma voĉo, ke en la lando estu ordo. Registaro dungas por ne tro alta pago diversajn filosofojn, kiujn dum ne malpli ol ok horojn ĉiusemajne instruas la popolon estimi leĝojn. Se ne sufiĉas tiucele filosofoj, lasu la aferon al soldatoj, ĉi tie gravaj estas ne rimedoj sed rezultatoj. Uzanto kaj laboristo devas estimi leĝojn jen ĉio — tiel li finiĝis ludante per la fingroj.

— Ne, li ne estas malsaĝa; mi dubas, ĉu li estas reĝo, mi ekpensis kaj demandis:

— Ĉu vi estas kontenta pri la nuntempa registaro? Li respondis ne tuj:

— Ĝi faras malpli ol ĝi povas, mi diras. Oni devas dume enlasi enmigrintojn en la lando. Sed ĉar ni havas

politikan liberecon, kiun ili povas uzi, oni postulu pagon... Ĉiu el ili kunportu 500 dolarojn. Posedanto de 500 d. estas dekoble pli bona ol tiu, kiu posedas nur 50. Malbonaj homoj estas vaguloj, almozuloj, malsanuloj kaj ceteraj maldiligentuloj, ili ne estas bezonataj...

— Sed tio malplimultigas enmigrintojn, mi diris. La maljunulo kapjessignis.

— Jam poste mi proponas plenfermi la pordojn por ili en nia lando. Dume ĉiu kunveturigu iom da oro... Tio utilas la landon plue pligrandigi la limtempon por ricevi civitanan rajton. Poste oni estas devigataj ĝin tute neniigi. Oni lasu labori tiujn, kiuj deziras, sed tute oni ne devas doni al ili la rajtojn de l' Usonanoj. Estas sufiĉa kvanto da Usonanoj. Ĉiu el ili mem kapablas zorgi pri kreskado de la loĝantaro. Tiu afero ne koncernas la registaron. Ĝi devas esti ŝanĝata. Ĉiuj anoj de la registaro devas esti akciuloj de industriaj entreprenoj. Tiele ili pli facile komprenas la interesojn de l' industrioj de la lando. Nun mi estas devigata korupti senatanojn, por ke ili konvinkigu pri la neceso por mi... de kelkaj bagateloj... Tiam tio fariĝos superflua... Li eksopiris, puŝfleksis la piedon kaj diris:

— La vivo estas vere vidata nur de sur altaĵo el oro.

Nun, kiam liaj politikaj vidpunktoj estas sufiĉe klaraj, mi demandis lin:

— Kion vi pensas pri religio?

— Ho, li ekkriis, frapante sin al la genuo kaj energie movante la brovojn, mi tre favore pensas! Religio bezonas la popolo. Plej sincere mi kredas je tio, kaj eĉ mi mem predikas en preĝejo... Jes!

— Kion vi predikas? mi demandis.

— Ĉion, kion povas diri en preĝejo vera kristano, ĉion! konvinkege li diris. Mi predikas cetere en malriĉa paroĥo. La malriĉuloj ĉiam bezonas bonan vorton kaj patrecan instruon... Mi diras al ili...

Lia vizaĝo dum momento vidigis infanan mienon, sed tuj li firme kunprematis la lipojn kaj levis la fingrojn al la plafono, kie amintrigo honteme ŝirmis nudan, dikan korpon de virino, havante rozan haŭton kvazaŭ ĉe jorkŝira porko. Senkoloraj liaj okuloj speguligis en sia profunda mikskoloroj de farboj sur la plafono kaj rebrilis multkolorajn fajrecojn. Li mallaŭte komencis;

— Gefratoj en Kristo! Ne cedu tentojn de ruza diablo de envio, forpeli ĝin per ĉio surtera. La vivo sur la tero estas mallonga: La homo nur ĝis 40-jaraĝo estas bona laboristo, poste li ne estas dunginda en fabrikejo. La vivo ne estas firma. Vi laboras, unu malcerta manekmovado kaj la maŝino dispecetigas viajn ostojn, sunfrapo kaj jen fino! Ĉie vin insidatendas malsanoj, ĉie malfeliĉoj! Mizera homo similas blindulon sur tegmento de alta domo, kien ajn li sin direktus, ĉie li falos, kaj frakasigos, kiel diras la apostolo Jakobo, frato de apostolo Judaso. Fratoj! vi ne devas valorigi la surteran vivon ĉar estas kreitaĵo de diablo, rabanto de animoj. Regno via, ho, karaj infanoj de Kristo, ne estas en ĉi tiu mondo, kiel la regno de via Patro ĝi estas en la ĉielo. Kaj, se vi, pacience, senplende, senmurmure kaj trankvile finos vian surteran vojiron, li akceptos vin en la ejojn de l' paradizo, kaj rekomencos vin pro viaj surteraj penadoj per eterna feliĉego. Tiu ĉi vivo estas nur purigejo por viaj animoj, kaj ju pli vi suferas ĉi tie, des pli granda ĝuego atendas vin tie... kiel estas dirinta la apostolo Judaso mem.

Li montris per sia mano la plankon, ekmeditis kaj daŭrigis malvarme kaj decide:

— Jes, karaj fratoj kaj fratinoj! Tiu ĉi tuta vivo estas vanta kaj senvalora, se ni ne oferdonos ĝin pro amo al proksimulo

kiu ajn li estas. Ne fordonu vian koron al demonoj de envio! Kion vi povas envii? La terecaj bonaĵoj estas fantomoj, ludilo de diablo. Ni ĉiuj mortos, riĉuloj kaj mizeruloj, reĝoj kaj karboministoj, bankieroj kaj stratbalaistoj. En la malvarmetaj paradizĝardenoj, eble karboministoj fariĝos reĝoj, kaj reĝoj estos forbalaantaj el la ĝardenovojetoj la defalintajn foliojn kaj kovertpaperetojn de bonbonoj, kiujn vi manĝos ĉitutage. Fratoj! kio estas dezirinda sur la tero, en tiu ĉi malluma arbaro el pekoj, kie la animo erarvagadas, kiel infano? Vi iru en la paradizon laŭvoje de amo kaj kormildecu, toleru senforte ĉion kion al vi donas la sorto. Vi amu ĉiujn, eĉ la humiligantajn vin.

*Li denove fermis la okulojn, kaj balanciĝante en apokseĝo, daŭrigis:

— Ne atentu la homojn, kiuj instigas en viaj koroj pekan senton de envio, vidigante al vi malriĉecon de iuj kaj riĉecon de aliaj. Tiuj homoj estas senditaj de diablo. La Sinjoro malpermesas envii la proksimulon. La riĉuloj estas ankaŭ malriĉaj... malriĉaj pri amo al ili. „Ekamu la riĉulon ĉar li estas elektito de Dio!“ ekkriis Judaso, la frato de l' Sinjoro, ĉefpastro de l' templo. Ne aŭskultu predikadon pri egaleco kaj aliaj elpensadoj de diablo. Kion signifas egaleco ĉi tie sur la tero? Vi aspiru nur egaligi unu al la alia per animpureco antaŭ via Dio, Vi portu pacience vian krucon, kaj rezignemo malpezigos vian ŝarĝon! Kun vi estas Dio, infanoj miaj, kaj nenio alia estas bezona!

La maljunulo eksilentis, malferminte la buŝon, kaj brigligante la oron de siaj dentoj, triumfmiene min ekrigardis.

El la rusa tradukis J. B. (Daŭrigota.)

Financa situacio de Sennacieca Revuo

1 decembro 1921 ĝis 31 marto 1922

Enspezoj:	fr. fr.
En kaso la 1 decembro 1921	321,25
Abonoj ricevitaj de 1 dec. ĝis 31 marto	1702,20
Monhelpoj ricevitaj de 1 dec. ĝis 31 marto	871,05
Anoncoj	23,10
Ponumera vendado	29,20
Benefico de nia librejo	52,40
Ŝanĝo en fr. fr. de diverslandaj monoj	252,05
	<u>3351,25</u>

Elspezoj:	
Kosto de la N ^o 2, 3/4, 5, 6	2057,75
Postelspezoj	228,50
Kosto de adresiloj	70,00
Amortizo de nia prunto al K ^{do} Lanty	400,00 ¹⁾
Diversaj elspezoj	30,95
	<u>2787,30</u>

En kaso la 31 marto 1922 563,55²⁾

(1) Tiel, nia ŝuldo al K^{do} Lanty reduktiĝas je 1363,95 fr.

(2) Plus la jena kvanto de diverslandaj monbiletoj: 5883 mk. G., 8160 mk. P., 35 mk. F., 65 mk. E., 2070 kr. H., 273 kr. Ĉ., 3330 kr. Aŭst., 30 din. Jug., 177 lir., 813 lev., 5 esk. Port., 20 lej. rum.

Plie, nia agento en Leipzig (K^{do} Richter) posedas en kaso: 11 744,78 mk. G.

Municio por Sennacieca Revuo

(Ricevita dum Marto)

AUSTRIO: Zidek, Schwehla, Dimtigam: ope 624 kr.: Siegfried Feith 208 kr. — FRANCIO: Bertrand 2 fr.; Liberiga SteloTroyes 1 fr.; J. Habert 3 fr.; Spago 3 fr.; Ehm 4 fr.; Lanty 100 fr.; Robin 5 fr.; Migny 2 fr.; — GERMANIO: L. Revo 25 Mk.; Schulz. Walter 15 Mk.; Manske 3 Mk.; Gottgetreu 3 Mk.; Barthelmes 2 Mk.; Bruno Kopriwa 10 Mk.; — HIS-PANIO: Artigas 10 fr.; ITALIO: Torquato-Gobbi 5 lir.

Sume: 832 Kr. Aŭst.; 130 Fr.; 50 Mk. Germ.; 5 Lir.



La Angulo de l' Poetoj

METIISTOJ

de LUDVIGO KASSAK

Ni ne estas sciencistoj, nek stultaj orbuŝaj predikistoj
kaj herooj ni ankau ne estas, kiujn sovaĝaj ĉinadratoj¹⁾ akom-
al batalo [panas

kaj nun svene kuŝas sur marprofundaĵ',
sur sunaj montoj

kaj sur ĉielkojnbatitaj kampoj dise, dise sur la tuta mond'.

Sub ĉielfirmaĵo blua nun en vagada sang' banas
la horoj.

Sed ni jam estas malproksime de ĉio, sidas funde en mallumaj
ludemegoj:

senvoĉe kaj plentute, kiel la maldisa materio mem.

Hieraŭ ankoraŭ ni larmis kaj morgaŭ, morgaŭ eble
nian aferon admiros la tempoj.

Jes! Ĉar el niaj malbelaj, senformaj fingroj jam ĝermas
la freŝa fort'

kaj morgaŭ ni jam festenos sur la novaj muroj.

Morgaŭ el asbest', fer' kaj gigantaj granitoj vivon
ni ĵetos sur la ruin'

kaj for kun la sendekoracioj! kun la lunlum'! kaj la kanto-
[dancejoj

Egajn konstruaĵojn ni ĝisnubigos kaj ludilon modelos
laŭ la Eiffel-tur'.

Bazaltpeklavajn pontojn. Sur la placojn novajn insignojn el
[sona ŝtalo

kaj sur la mortaĉintajn relojn ni puŝos kriegantajn, fajrajn lo-
[komotivojn,

por ke ili brilu kaj finkuru la vojon, kiel la ĉielaj
kapturnantaj meteoroj.

Ni miksos novajn kolorojn kaj submaren novkablighos
kaj gravedigos la maturajn, senparajn virinojn, por ke novan
specon lulilumu la ter'

kaj ĝoju la novaj poetoj kantantaj antaŭ ni la novan vizaĝon
de l' tempo:

en ROMO, PARIZO, MOSKVO

BERLINO, LONDONO kaj BUDAPEŝTO.

El la hungara esperantigis Goldhamer Géza

(1) Ĉinadrato estas la muzikbruo de diversaj militistaraĵ
muzikinstrumentoj.

JUNA LABORISTO

de LUDVIGO KASSAK

Al ci mi parolas, kiu ne estas pli kaj ne estas
malpli ol mi,
kiun homon mi modelas malgraŭ cia obstineco
kaj kiun semajne ses tagojn ĝis nekkoneco ŝmiras
la malpuraĵ' de la fabrikoj.
Ellaboritan mian manon mi metas en cia ellaborita maro.
Frato!

Ni estas la filoj de l' forto.

Ni estas maldisigeble unu en malplenaj, kiel
la migrantaj meteoroj kaj la eldraŝitaj tritikeroj.

La lafanta sango forĝas nin kune.

Neniam mi demandis, kiomjara ci estas, kio estas cia nomo,
de kie cin bobenis la sorto?

Kiam unu al la alia ni puŝiĝos, mi neniam miras, ĉu blonda
aŭ bruna ci estas.

Ho ni komprenas unu la alian plejege.

Hazardokazoj kaj jarcentoj vane spekulacias je ni.

La pontoj kuŝiĝas sub nin.

Pontoj ĝoje idas por ni pontojn

kaj nian fruntan plenfundas la certec' de la repag'

kaj ni scias — en nia sango laboras la horloĝo de la verfarado

kaj ni scias — nur sur nia detruo estos surŝtonigeblaj
la novaj muroj.

Oron, lumon kaj varmon oni premas el ni.

Sed ni kredas je la ekosceditaj pordegoj kaj

en la ebleco de la malokupitaj vojoj sur la liberaj kampoj.

Ĉe la kruĉigo de l' stratoj mi kun ci konatiĝis,

sub la malseka ĉielo de la eligeo, je la maltempaj, aĉaj

amaĵoj, dum la panmalhaveco, dum la lernejevitado,

je la bagatelaj ŝteletadoj,

kies ombro sur ci fermenteliĝis

kaj nun kun nigra signo sur la frunto por ĉiuokaze

ci volas ekiri.

Ni volas ekiri sur la alta digo.

Malsupre malsprite kunlaviĝis la bordoj.

Sed ni konas la celon.

Kredoj en sango brilbrulas.

Brilbruloj en sango kantas.

Celo! Celo!

La feliĉaj standardoj de l' vivo ludas en la perspektivo.

Ho, ekrovita juna mia frato.

Esperantigis Goldhamer Géza.



La "Aktivismo"

Verkis: *Mácza János*

Dum la unuaj jaroj de la masbuĉado, kiam malantaŭ la de pafilpikilaro ŝlositaj limoj, unu pri alia ne sciante, ekvekiĝi komencis la revoluciaj elementoj de la disigitaj landoj, kiam *Ivan Goll*, *Marcel Martinet*, *Franz Pfempfert*, *P. J. Jouve* kaj aliaj eklevi sian homan voĉon kontraŭ la milita mortigado, samtempe ankaŭ en Hungario ekmoviĝis malgranda grupo. *Kassák-Lajos* (Ludvigo Kassák) staris je la pinto de ili kaj ekkomencis pere de la "Tett" (Ago) titolita ĵurnalo la idologian militon kontraŭ la imperialista-kapitalista ideologio. La "militintereso" gardinta advokato malpermesis la ĵurnalon, sed el la sangmaro sur la viv-superaĵon sopirantan homon tiam jam eĉ mil advokatoj ne estus povintaj mortisufoki. Oni eldonis novan ĵurnalon sub la titolo "Ma" (Hodiaŭ) batalinta ĝis fino dum la lastaj jaroj de la milito kaj revolucio kaj nun en Viena emigro daŭrigas la komecitan laboron.

Jen la mallonga historio de la movado, kies du reprezentaj poemoj aperas en nuna numero de Sennacieca Revuo.

La movado sin "aktivismo" nomanta ne estas sole literatura aŭ arta movado, sed politika ekmoŭvo ĝi ankaŭ ne estas. Ĝi elĝermis el la fermentado de la societo, — la socia fermento ĝin el si elĵetis kaj estas la kunigo de la en la plej pura senco revoluciula animo. La animo de tiu revoluciulo, kiu krom la ekonomiaj eblecoj volas konstrui ankaŭ tion, kió estas trans la ekonomiaj eblecoj. Kiu volas konstrui tiun homon, kies homeco, esenco kaj formo samtempe estas. La homon neniam kontentan, ĉiam plipretendeman, ĉiam plu, plibonon, pliperfekton kaj pliveron volantan. La vivan, agan fonton, kiu ne nur scias kaj komprenas la leĝon de la mondo reganta, eterna movo, eterna ŝanĝo sed, kiu mem plejmezure submetas la propran vivon al tiu ĉi leĝo, kiu ne toleras formajn ligilojn, ĉar en ĉiu momenta situacio li mem estas la formo kaj la esenco samtempe. La homon, kiu ne toleras kadrojn, ĉar kadroj estas la bariloj de la ŝanĝo. La plejmalamikon de ĉiaspeca konservativismo.

Tiu ĉi "aktiva" (aga) homo, tiu ĉi eterna revoluciulo estas la idealo de la hungarlingve verkantaj aktivistaj artistoj. Por tiu ĉi homo ili artfaras la detruan kaj konstruan ideologian laboron; la batalon kontraŭ la de la hieraŭoj infektita, mensoga, senhoma homo kaj la batalon por la morgaŭa, ekverigonta, ekpurigonta homo.

Esperantigis: *Goldhamer Géza*

El la Redaktejo

Multaj personoj skribis al K.do E. Adam kaj ne ricevis respondon. Ili plendas al mi pri tio. Estas do necese, ke nia tuta legantaro estu sciigata pri la malapero de mia antaŭulo ĉe la Redaktejo de S. R. K.do E. Adam mortigis sin en oktobro 1921. Vera strangulo li estis. En sia testamento li skribis jene: "Oni silentu pri mia morto. Se mi havas amikojn, ili ne funebru, sed male ĝoju. Oni ne malŝparu lokon en la gazeto por iu teda nekrologia artikolo. Se mi ne estus plene konscia pri la sen-signifeco de mia vivo eble mi kuraĝus diri al la kunbatalintoj: 'Se vi volas iel memori pri mi, tio estu nur per senlaca propagando por sennacieca lingvo . . .'"

Multaj aliaj strangaj troviĝas en tiu testamento, sed, laŭ la deziro de la formalaperinto, ni silentu. *E. Lanty*

Pola Satano: Eble "maldeca" estis la loko, kie aperis la bibliografia noto pri *Korolenko*. Sed ankaŭ via artikolo estus "maldeca" por inde honori la rusan verkiston mortintan. Ni publikigis pecon el lia verkaro. Ĉu tio ne estis la plej inda honorilo? —
Fratece. Red.

Diskutejo

Ni ricevis la jenan leteron:

Londono 9^{an} de Marto 1922

Estimata Redaktoro,

Se "Sennacieca Revuo" estus ordinara kapitalista gazeto, mi ne estus skribinta ĉi tiun leteron ĉar tia gazeto ne enpresus refuton de malveraĵo en siaj kolonoj kaj tial mia tempo estus malŝparita. Sed, tamen, ĉar la esencoj de Esperantismo kaj Komunismo estas vereco, mi ne dubas ke vi enpresos mian skribaĵon.

En la Februara numero de "S. R.", sur paĝo 12, en la fako "El niaj leteroj", aperis elĉerpaĵo el letero de "Londona Satanino", kiu faris kelkajn asertojn pri la Londona Esperanta Klubo.

Kiel ŝi diras, la klubo esas neŭtra kaj ne permesas diskutojn pri politikaj kaj religiaj temoj. La kunvenoj estas por Esp-istoj de ĉiuj politikaj kaj religiaj pensoj kaj ĉe ili oni povas sin ekzerci en la lingvo kaj ĝui sociajn rilatojn kun aliaj Esp-istoj.

Via korespondanto diras:

"Samtempe, oni vendas tie la 'Sankta Biblio'n kaj iu diris al mi, ke oni gastigis tie episkopon kaj anon de 'Salvation Arm'; krome oni publike anoncas diservojn ĉe pregejoj! — Oni ne diskutu pri politiko, sed estas tie, kiel ano, poliestro de Scotland Yard, kiu havas la specialan taskon zorgi la reĝon."

Tiuj diroj estas veraj, mi ne kontraŭdiras ilin, sed mi asertas ke via korespondanto intence citas ilin en maniero kiu donas malveran kaj nebonan impreson.

Oni vendas la "Sankta Biblio'n" — Jes la esp tradukojn de ĝi. Kial ne? Oni vendas ĉiajn esp. librojn ĉe la klubo, sed tio ne kontraŭas la neŭtran bazon de ĝi.

* Oni gastigis tie episkopon kaj anon de "Salvation Arm". Kial ne? Ĉiu rajtas ĉeesti la kunvenojn de la klubo kaj tie oni volonte gastigus la Reĝon de Britujo kaj Lenin kun sama varmece.

Estas tie, kiel ano, poliestro de Scotland Yard. Certe! Kiel mi jam diris, ĉiu rajtas ĉeesti kaj aniĝi. Ĉar kelkaj membroj de la klubo estas komunistoj tio ne signifas ke la klubo estas politika. Do, kial ĝi estas politika ĉar poliestro ĉeestas, kiel ano?

Oni publike anoncas diservojn ĉe pregejo. Nur la ordinarajn diservojn en Esp.o, kiuj okazas ĉiumonate en Londono. Oni kompreneble anoncas ĉiujn okozontajn Esperantajn aferojn.

Via korespondanto, kiu videble estas nek Esp-isto nek komunisto diras: "mi esperas ke baldaŭ ni, komunistoj, starigos nian propran klubon."

Tion, mi, Esp-isto kaj komunisto, ankaŭ forte esperas!

Londona "Diablo"

Respondo: Ni ne scias kio estas tiu doktrino: "Esperantismo", pri kiu parolas S^o L. D.; sed ni volonte konfesas, ke por ni ankaŭ la esenco de Komunismo estas vereco. Nu, ŝajnas ke nia Londona komunisto (?) pli bone konas la doktrinon de esperantismo ol tiun de *Karl Marx*. Se tiel ne estus, li certe komprenus, ke sincera kaj klaskonscia komunisto ne rajtas foruzi, pli ĝustedirite, misuzi sian energion en kromklasa direkto. Kvankam fervora kaj lerta esperantisto, L. D. tamen ne aliĝas al S. A. T. ne abonas "Sennacieca Revuo"n kaj neniel subtenas la movadon celantan meti esp-on je la servo de la Revolucio.

Ĉu do ili estus pravaj tiuj revoluciuloj, kiuj asertas, ke la esp. movado estas burĝa afero, ŝtelanta fortojn de la revolucia movado? Jese oni devus respondi, se ĉiuj esp. komunistoj agus kiel S^o L. D.

L. D. diras, ke nia korespondantino estas "nek esp.to, nek kom.to". Pri ĉi tiu lasta kvalito ni ne povas aserti nek kontroli. Sed, ĉar ŝi skribis en esp.o, ŝajnas, ke ŝi estas esperantistino! . . . Sed eble L. D. volas diri, ke ŝi ne sufiĉe konas la doktrinon de esperantismo. Tiaokaze ŝi estu gratulata, ĉar laŭ ŝajne tiu doktrino celas nur kasti la klaskonscion ĉe la esp. komunistoj, kiel pravas per sia agado S^o Londona Diablo. — Red.

La unua devo de ĉiu membro de S. A. T. estas aboni Sennacieca'n Revuo'n



PEDAGOGIA FAKO

Nova lernejo de Max Tepp

Tradukita el germana lingvo kaj mallongigita de SIEMSS,
FREINET kaj VITTECOQ.

Tiu libro estas la rakonto de tre interesinda eksperimento, kiu ankoraŭ nun daŭras en Hamburg'a urbo, kie realiĝas tiu malnova utopio k.e. Nova lernejo.

Kio do estas Nova Lernejo?

Estas, antaŭ ĉio, lernejo por infano, kiu konsideras ĉe infano nek laboriston nek civitanon de ŝtato, sed infanon, kiu morgaŭ estos «homo». Ni instruas al infanoj aniĝi al sistemoj aŭ religioj; la instruantoj de N.L. pensas, ke ni ne havas la rajton altrudi al estontaj generacioj nian sciencaron kaj niajn vivmanierojn. Ĉar ili estas konvinkitaj, ke ĉiuj difektoj de nia socistato devenas de manko de realaj «homoj», ili ne celas la plej bonan uzadon ekonomian de homo, ili serĉas «homon».

„Tute egale, ili diras, ke mi sciu tion aŭ tion-ĉi, kondiĉe ke mi komprenu sencon kaj kialon de ĉio ĉirkaŭ mi kaj en mi mem. Ne gravos, ke mi ne konu poste, kiel la famuloj agis, sed utilos, ke mi sciu en konvena tempo, kion mi mem devas fari.“

„Ni certigas, ili diras, la potencon de edukado kaj sciencoj ĉar ni kredas, ke ili kondukas al amo, al komuneco, al FRATECO. Kaj NUR tio gravas por ni.“

Sed elfari homojn el infanoj estas malfacile por gepatroj kaj instruantoj.

Tio estis laboro longedaŭra, kiun helpis multe la fondo de «Wandervogel» (migrantaj birdoj) societoj por gejunuloj. Per liberaj ekskursoj la junularo iom post iom sin liberigis el influo de gepatroj, labormastroj kaj instruistoj mem. Kiam tiuj gejunuloj fariĝis ĉu patroj ĉu patrinoj kaj kiam la Revolucio okazis, ili starigis du Novajn Lernejojn. Kaj nun, malgraŭ reakcio, pli vigla tie ol ie ajn, la N.L. prenis fortajn radikojn. Kaj ŝtato daŭradas pagi la instruistojn de tiuj publikaj lernejoj. Eĉ laŭ trudo de l'gepatroj, la Hamburg'a ŝtato devis krei trian N.L.

Jen unu N.L., tiu sur la strato Breitenfeld ekzemple. Lernejo kiel aliaj, kiel la niaj. La instruistoj mem de N.L. diras, ke nek la loko, nek la materialo gravas, sed nur la spirito. La lernoĉambroj perdis sian ĉiaman numerigon, kiu estis anstataŭigita de nomoj de grupoj: „fratoj fidelaj“ „kuraĝuloj“ k. t. p. La verkaĵo vidigas kiel la infanoj estas liberaj por aranĝo de sia lernejo. Ili havas ĝardenon, sportkampon kaj eĉ boateton sufiĉe vastan por enteni 18—20 junulojn. Per tiu boateto, ili vojaĝis sur kanalo Elb-Trade-Baltik'a maro dum 14 tagoj, preparante mem sian manĝaĵon. Tio vere estis lernejo sen libro.

Unuvorte nenia grava speciala aranĝo. La spirito nur ŝanĝis, kaj unue tiu de l'instruanto, kiu per obstinega laboro popularigis sian metodon dank' al kiu li edukas infanojn kiel „homojn“.

Estas do iniciativaĵo esence revoluciema, kiu estas studotinda por permesi al ĉiu el ni ion ĉerpi laŭ povo. La tuta verko konsistas el ses ĉapitroj.

1a ĉap. Silento—Ordo—Disciplino

„La instruistoj de N.L. estas konvinkitaj ke „por trafi samtempan evolucio de lernejo kaj ŝtato, estas unue necese, ke rilatoj inter homoj ŝanĝiĝu. La plej grava afero ne estas instrui niajn lernantojn pri gramatiko, fiziko kaj geografio; estas unue necese, ke ni ekkonu nian kunvivanton, tio signifas ke ĉiuj homoj fratiĝu. Inter fratoj, kiuj sin amas reciproke, ceteraj aferoj kiel ekzemple la disdivido de bienoj, de manĝaĵoj aranĝiĝos sen niaj klopodoj. Vi konsentas, ke la okazonta socistato naskiĝos el nia lernejo. Ni deziras homojn!“

Kiel tion trafi? Oni donas al ni la sekreton sed estas necese ke oni kuraĝu ĝin tute voli: „Ni do komencu vivi frate kun la infanoj. Iliaj esprimoj, volo, sentojn ni devas respèkti. Ni deziras estimi iliajn ludojn, malsaĝagojn, amajn sentojn. Ni volas ilin eduki kiel fratojn, eĉ se ili nin malakceptus. Kia kontrasto kontraŭ la kutimaj rilatoj de edukantoj al edukatoj.

„Ja, ĝi (malnova lernejo) havis severan disciplinon. Bastono kaj aŭtoritato regnis kaj nenia individua kresko estis ebla. Sed kiam devigo kaj severega disciplino ĉesis, tuj la junuloj konfuziĝis. Ili ne estis lernintaj ordon ĉar nur devigo subtenis ordon. Ili ne estis edukitaj por preni respondecon, iliaj edukistoj kaj gepatroj respondis por ili.“

„Post foriro de lernejo, tiaj junuloj ne povis kuraĝi pri siaj agoj ĉar lernejo estis klopodinta por malŝarĝi ilin el respondeco, disciplino, ordo.

Utopion! oni eble hore krios.“

Tepp igas nin ĉesti liberigadon de lernejo. Unue, la infanoj blindigataj de tiel nova lumo, timigataj poste de l'bruo kaj malordo, serĉantaj ree kondukanton, petantaj sian instruiston, donas al si mem ian diktaturon ĝis kiam ili fine pensas:

„Ni senĉese faras novajn leĝojn! ni altrudas malpermesojn! ni malbenas! Kaj ĉio senutile.“

„Ni nur povos daŭrigadi ordon en lernejo se ni provas nin interkompreni, se ni pardonos nin unu la alian, se ni ne malafable agos kontraŭ nia kamarado aŭ lin ne riproĉos kiel faris la lerneja konsilantaro, unuvorte se ni provos vivi kiel fratoj kaj nin interami. Kiam ni tiel ekvivos, leĝoj ne plu estos necesaj ĉar, tiam, ĉiu obeos nur unu leĝon, kiu estas en si mem, kiu estas la leĝo de l'Amo!“

2a ĉap. Devigo kaj Libereco

„Kiam infanoj ne volas agi kiel ili devas, estas tiam bezone, ke oni uzu devigon. Sen devigo, oni trafos nenian rezultaton kun infano . . . „diras la Hamburg'aj gepatroj kaj ankaŭ multaj instruistoj. Pri tio mi respondas:

„Vi ja komisiis nin por eduki viajn infanojn, sed ne por ilin dresi, ĉu ne?“

„Devigo estas pero por dresado, kontraŭe libereco estas pero por edukado.“

„Edukado, laŭ la ĝisnuna sistemo, ŝajnas havi kiel taskon ĉion mortigi ĉe infano por fari el li maŝinon je malviva materialo. Tial tiu edukado dresis generacion, kiu estas kondukita al trompo, mensogo kaj milito. Tiuj homoj deziregis nur gajni monon sed ne pripensis ĉu ilia laboro estas bona aŭ ne, utila aŭ senutila.“

„Ekzamenu infaneton, kiu ĵus ekĉeestas lernejon. Tiu ĉarmuleto rondvanga kaj rozkolora paliĝas kaj silentiĝas. Tiu petola kaj ridema knabino ektimas. Jen la rezultato de dresado. Tiu knabo subite nenion konas, kiu hieraŭ mem sur strato kaj en najbaraĵo pri ĉio respondis. Li, kiu demandis milfoje kaj milfoje eksperimentis, kiu malfermis okulojn kaj orelojn por kompreni la mirindaĵojn mondajn alvenis lernejon kaj tie perdiĝis. La lerneja laboro komencis nur kiam la infanoj estis mortigitaj intelekto“

„Infano! Tiu mizera estulo, tiu neniulo, kiu ne servas la nunan ŝtaton sed devas esti edukata por profito al ŝtato! Ha! ni ne plu povu fieriĝi pri nia malnobla vivo! Forjetu de ni la vanecon de l'kredo je tia perfekteco de nia vivo, ke ni povu altrudi al niaj infanoj nian laboron, nian ŝtaton, nian lingvon, nian opinion! Kaj kiel? Per aŭtoritato: per bastono aŭ frandaĵoj.“

Por trafi nian nunan celon, kiu estas la alveno de novaj tempoj ni daŭre devas kredi, ke „Infano estas nek malbona nek mallaborema sed nur ke libereco bonigas kaj konsciigas homojn.“

Sed infanoj ne plu volas plenumi ĵajn agojn. „Tiam, nova forto, nekonita ĝis nun, alvenas por moderigi kaj direkti tiun liberecon, ĝi estas la sento de nia komuna socio; ĝi estas amo unuiganta nin ĉiujn; la sento al ni haviganta la forton fari ĉiujn laborojn, kiujn ni volonte evitus sen tio.“

La verkaĵo ankaŭ montras grupon da lernantoj libere vivantaj ĉe kamparo, forgesantaj iliajn devojn kaj poste provantaj aranĝi organizaĵon. La instruanto, ofte delogita, vidas ilin fine vivantajn kunrate helpante unu la alian. „Tiel agante, ili ne sin interinstruas, ja ili interŝanĝas amon. Tiu intima kunlaborado estas fonto de grava morala forto, kiun tiel bezonas nia popolo. Sen tia forto, naskita de reciproka helpo, oni povas edifi nenian novan ŝtaton. Tial, per tiuj knaboj, la popolo de l'nova ŝtato estas alveninta.“

„La agado plej efika povata de ni ĉiuj, viroj kaj virinoj, estas unuopa agado, de homo al homo, de animo al animo, agado per parolo, per ekzemplo, per la tuta sinmemajo.“

El „La pioniroj“ de Romain Rolland.

„Ŝtato ne estas patrolando, ĝi nur estas ties prizorganto — bona aŭ malbona laŭokaze, ĉiam erarema. — Ĝi posedas forton kaj ĝin uzas. Sed de kiam homo estas homo, tiu-ĉi forto ĉiam fiaskis ĉe la sojlo de l'animo libera.“

El „La pioniroj“ de Romain Rolland.

„Estas naŭzege al la spirito prikonsenti, ke io povas esti bonajo de mitito.“

El „Posedo de l'Mondo“ de Duhamel.

Kontraŭ Instruado pri Malamo

(Oficiala raporto de la franca sekcio de *Edukistara Internacio*)

En 1919 dum la unua postmilita federacia Kongreso de la sindikalistaj francaj geinstruistoj, la granda majstro ANATOLE FRANCE kriis al ni, per la nediskutebla influo de sia pensula vivo: „Malamigu, malamon! Bruligu, bruligu ĉiujn librojn, kiuj instruas malamon!“ Li plilaŭtigis siajn parolojn per tiuj de MICHEL CORDAY ekkriinta: „Mi eksentas malamon nur kontraŭ malamo!“

En la sama parolado — parolante pri Instruado — la majstroj petas ke ni kontraŭbatalu tiun edukadon, kiu edukis la cerbojn de ĉiuj geviroj cele al akcepto kaj glorigo de la milito kaj ĝiaj krimoj.

En 1920, ROMAIN ROLLAND publike mallaŭdegis la ruinegajn rezultatojn de l'instruado, konceptita de l'Eŭropa burĝaro dum la 19a kaj 20a jarcentoj. „Oni ŝuldas al ĝi, li diris, la ĝeneralan spiritstaton de la hodiaŭa Eŭropanaro, tiun malsaman idealon konsistantan el naciema trommemestimo, el malfido kaj envio reciprokaj inter la popoloj, tiun klanan egoismon, kiu serĉas sian feliĉon en la najbara malfeliĉo, tiun malsanecan gloregadon pri morto kaj mortigo pro sovaĝa patrolando.“

La pensuloj restadas sur la pensa fako. La proletario havas la grandan meriton kaj la penigan respondecon aĝi.

En la „Basses-Alpes“ departemento, niaj kamaradoj ek militis vigle kontraŭ inspektoro por unuagrada lernejoj, kiu — sen prihistoria honesteco — volis trudenŝovi en la historian programon de siaj distriktlernejoj, spite la ministraj avizoj, opiniojn pri la 1914—18 milito, pri la rusa malfideliĝo, bolŝevismo, k.t.p.

Niaj kamaradoj de la „Bouches-du-Rhône“ departemento kunprotestis kun siaj kamaradoj el „Basses-Alpes“ kontraŭ tiaj inspektorfantaziaĵoj. Ilia ĝenerala kunveno voĉdonis „Gauthier kaj Peyrache“ tagordon, kiu, je la nomo de historia Vero, malkaŝe kaj firme kontraŭparolas instruadon pri milithistorio, kies detaloj estas nesufiĉe konataj kaj kontrolitaj, kaj kiu rekomendas bojkoton de la historiaj lernolibroj entenantaj tendencaj rakontoj, nerespektantaj la lernejan neŭtralecon.

En la spirito de ĝiaj aŭtoroj, ĉi-tiu tagordo, publikigita en la numero 126 de la federacia bulteno (31a de julio 1920), devus ankaŭ la Peyrache a opinio, signi la unuan agadon de la serioza kaj firma batalo, kiun nia federacio estas riskonta kontraŭ Instruado pri malamo ĉe la lernejo.

Kiamaniere oni instruas malamon

a) *Cirkuleroj*. — Hodiaŭ ni volas urĝe peti de niaj geinstruistoj ke ili malhelpu militemon veneni edukadon en niaj lernejoj. Ni devas penetrigi ĉi-tiun ideon en la koron de la popolamaso, same ankaŭ en la koron de la geinstruistaro.

La sintenado de niaj estroj, inspektoroj, rektoroj, ministroj, iliaj gvidkonsilioj, cirkuleroj havas de nun militeman premision. Iliaj instrukcioj novaj memorigas la diktatorajn tendencojn de la reganta kaj konservativa burĝaro.

Tiuj instrukcioj rilatas pri mil temoj ne koncernantaj la lernejan edukadon. Mi ne volas riparoli pri la milittempaj cirkuleroj pli malpli gravigitaj de neceseco je „nacia defendado“ ne sufiĉe diskutata pro militmallumo. Sed la hodiaŭaj cirkuleroj celas serĉadon de militbibliotekaj kolektoj, pri apologio de la ŝtatpruntoj, pri komerco de ĉiuspekaj insignoj, pri komercemaĉa entrepreno de publikaj monumentoj, k.t.p.

La instruisto fariĝis salajrata agento (li ricevas 6 centimojn po ĉiu franko de vendita rento) de la granda firma nacia de papermona fabrikado, bonvola agento de l' „Unuiĝo de

la grandaj francaj asocioj kontraŭ la malamika propagando", li estos morgaŭ la galonhavonta profesoro pri patriotismo por la blankaj gvardianoj de burĝaro. Li perdis sian sendependecon. Oni faris lin komercvojaĝisto por la servo de oligarkio senskrupula, komisiita por disdoni hieraŭ kontraŭgermanan paŝtaĵon, hodiaŭ kontraŭbolŝevikan.

b) *Gravuroj.* — Ni volas ĉi-tie kondamni la amason da neestetikaj bildoj, malvirtigaj broŝuroj, frazoj pli malpli aŭtentikaj aŭ zorge rikoltitaj ĉe la buŝo de la malfeliĉaj elvojigataj viktimoj de "Franca Agado" (rojalista partio).



Ni abomene tremegas ĉe la vido de tiu bildo montranta multepezan modelan de "rabsoldato" mane teĥantan fumantan pafilon, per kiu li mortigis — seksperfortinte ŝin — knabinecon tere sternigantan. . . .

Samtempe ni abomenegas la brutulon, la genion de la desegnisto, tiun de la inventinto de revolvero, tiun de la fabrikantoj de la municioj por morto. Ĉefe ni mallaŭdas militon, kapitalismon, kiu naskas kaj nutras ĝin, vivante kaj ĝuante per ĝi.

S-ro Barthou mem en "heroaj paĝoj pri la granda milito" devis cedi pro bonaj sentoj, kaj raporti pri homarama gesto de tiu ulano vundita, kiu flegas per siaj propraj kuracaĵoj francan oficiron dum "higlander" donacas akvon de sia botelo. Vere oni sin demandas, kial ĉi tiuj tri viroj sin kontraŭbatalis!

Malamo kaj militema kolerego de la konservativuloj kaj de la demokratoj ŝanĝas celon. Nun ili atakas furioze niajn rusajn amikojn. G. Reuillard ĵus sonigis en "Humanité" (Homaro — komunista gazeto) alarmkion. Ni ne vidis la kontraŭbolŝevikan bildon, pri kiu li parolis. Ĝi estas titolita "la aventuroj de Ivari Basmanov". LENIN kaj la bolŝevikaj ĉefoj estas montritaj same, kiel idoloj de popolaĉo, kiun

Anglio, Francio kaj Italio batalas. "Ententon" cetere oni montras venkinta en la batalo . . . Ni vidos ĉi-tiun mirindaĵon kaj la imagkapablo de la bildfaristoj al ni liveros aliajn.

La burĝaro, ĉe la rando de l'abismo, volas forte sin kroĉi al ĉiuj mensogoj, influu ĉies opiniojn, eduki junajn cerbojn por restarigi sian ekvilibron, kaj plifirmigi sian senriskecon.

c) *Historiaj lernolibroj.* — La aŭtoroj en niaj historiaj lernolibroj imagas la homaron, same kiel ia Francio vastiĝinta sur la mondo.



Dum la antaŭmilita tempo, "Entento" klopodis esti pacema, "Triobla kunligo" militema. Germanio sin armis pli kaj pli. Francio kaj Anglio ne songis pri tio. Germanio revis pri ampleksa kolonia imperio.

Dum la hieraŭa tempo de la milito, "Entento" klopodis por ĝin eviti. Kontraŭe Centraj Imperioj faris la krimon neevitebligi ĝin kaj ĝin naski. Ĉiuj kulpoj estas flanke al Aŭstrio; Cara Rusio havas neniu prirespondecon; ankaŭ Serbio, Anglio (tion ĉiu scias), ekmilitis nur pro ŝtathonoro kaj atenco al belga neŭtraleco. "Perfida Albion" fariĝis lojala.

Afsiksiaj gasoj, submaro milito, torpedado de Lusitania, abomenaĵoj de l'invado estas nepardoneblaj kulpoj de niaj malamikoj. Germanoj meritis abomenegon de la tutmondo!! Ĉi-tio pravas, ke ni ne estas ankoraŭ malembarsataj per militema literaturo.

Rusio forlasis "Kunligitojn" El la revolucioj estis iuj pagitaj de Germanoj! Ili pacon traktis laŭ hontindaj kondiĉoj. Ententa paco estas ja justeca kaj homarama!

Jen tia estas la milithistorio, kiel rakontata al la lernantoj de la unuagradaj lernejoj, dum la ministro ordonas:

1a ne rakonti la 1914—18 an militon, kies historio ne estas ankoraŭ farita;

2a ne detale temi pri la diplomata historio de periodo tro malsimpleca kaj ne sufiĉe konata.

c) *Legolibroj*. — En la legolibroj oni priskribas ĉu okazajojn pri sangaj bataloj, ĉu grandiozajn epizodojn de la tragedia tutmonda barakto, aŭ oni rilatas kun faktoj admirigantaj patriotismon, memforgesemon aŭ homaramajn sentojn.

Sed ve! en ĉiuj libroj, eĉ malplej bonaj, ĉiupaĝe aperas malbelega militemo. Tenco al memapologio estas ĉie superreganta: Francio estas ja la remparo de la tutmondaj rajtoj kaj libereco. La okcidenta civilizacio ja haltigis la germanan barbarecon huffrapintan la mondon. Jam la silabara libreto Langlois (dua libreto) petas la sesjarajn geknabojn eterne memori, ke Germanoj kondukis same, kiel barbaroj kaj rabistoj, dediĉas porĉiaman honton al Germanio kaj eternan gloron al dolĉe milda Francio kaj al ĝiaj kunligitoj.

La elekto de la rakontoj celas kondamni ĉe niaj malamikoj patriotismon, kies ŝovinismajn trograndigojn oni salutas ĉe ni. Ni estas martiroj. Ili estas turmentistoj. "Boche" (Germanaĉo) estas ĉasbesto, kiun niaj lernantoj devas deziri ĉasi. La germana tiraneco superpendadas super niaj kapoj morgaŭ, same, kiel hieraŭ.

La aŭtoroj, kiuj sincere deziras malamigi malamon, ĝiajn perfertojn, sciencajn sovaĝaĵojn, stultaĵojn kaj mizerojn ne sukcesas traficelon, montrante — krom maloftaj esceptoj — nur Francojn heroajn kaj grandanimajn, lasante niajn solajn malamikojn prirespondajn pri malbonoj, malkaŝante ankaŭ militemon en la cerbo de la instruisto jam multe influata de tia atmosfero.

La citataj verkistoj estas: P. H. Loyson, Maurice Barrés, Le Goffic, B. Valloton, Henry Bordeaux, G. d'Esparbes, Pierre Loti k. t. p. oni trovas nek Romain Rolland, nek eksterlandajn verkistojn. La gazetistoj, kies dum militajn skribaĵojn oni citas, estas: P. Ginisty, P. Mille, R. Chauvelot ktp. . . . Ĉiuj apartenas al la sklavaĉa gazetaro. Neniu eltiraĵo estas elektita el la socialista gazetaro aŭ el niaj revuoj.

e) *Porbibliotekaj libroj*. — La libroj de la lernejaj bibliotekoj havas saman stampomarkon. La ŝovinistaj aŭtoroj, malamplenaj verkistoj al ni liveras militeman literaturon, kiu sufokas la nian saman, tamen tiel interesan, grandvaloran. La "rozkoloraj libroj pri la milito" estas sinsekvo je bestecaj hontegindaĵoj.

f) *Distraj kunvenoj*. — Ni volas ankaŭ montri, kiel grandan danĝeron, la projektojn, kiuj naskiĝas en la superaj medioj de la publika instruada administracio, kaj kiuj celas "plifortigi la pornacian senton, kaj disvastigi publike la principojn, kiuj reguligos la konduton de ĉiu bona civitano".

Niaj estroj revas verŝi, en la spirito de la gepatroj de niaj lernantoj, ian edukadon kaj oficialajn instruojn. Ili volas "instrui la popolon pri la okazajoj, kiuj preparas la estontecon (la antaŭparolo datas de oktobro 1918), kaj pri la principoj, kiuj bataligas la naciojn en tiu granda duelo, Barbarecon aŭ Civilizacion — Imperialismon aŭ Demokration — Perforton aŭ Rajton". Ili revas daŭre veneni la popolon per nutraĵo zorge pretigita, kaj senĉese renovigata. Ili provas erarigi la popolon per aro da kadukiĝintaj sofismoj. Ili provas ĝin enteni en la retoj, el kiuj ĝi ne povas eligi.

Do, la publikinstruada Ministro eldonigis, en 1919, volumon titolitan: "Programo kaj tekstoj por popollegaĵoj" de B. Manrellet, akademia Inspektoro. Oni starigis en tiu-

ĉi libro, — la titolon tion indikas — programon pri popolaj legaĵoj. Ili estas pruntitaj el la verkaroj de la ĉiutempaj verkistoj, el la volumoj de la Franca kolekto, el la paroladoj de la ŝtatpolitikistoj, el la broŝuroj porpropagandaj de la "Unuiĝo de la grandaj francaj asocioj kontraŭ la malamika propagando". Ve! la fonto, el kie ĉerpis la aŭtoro, montras sufiĉe la tendencon de la libro. La ĥora kanto — rekomendegata — celas vibrigi la entuziasman kordon por idealo nun preterpasinta: nacia idealo.

La instruisto estas do invitata, kompletigi sian laboran tagon aŭ semajnon per kunvenoj, en kiuj oni petas, ke li arte diru legaĵojn, kies elekto estas farita antaŭe. La kunsido okazos en la lernejo mem — "tiu domo de la France" — por tie memoriĝi patrujan religion kaj t. e. konkludo almenaŭ neatendita, samkiel mallogika — tiu nova religio devas nin konduki al estonteco, en kiu regos Paco kaj Justeco.

Ni ne plu eraras pri tio.

g) *Promenadoj ĉe la batalkampoj*. — Ni finos la kritikan ĉapitron, malaprobante la promenojn ĉe la batalejoj. Administra ĉirkulero, date julion 1920, informas al ni, ke la grandaj francaj asocioj kontraŭ malamika propagando decidis, ke vojaĝoj por lernantoj de publika aŭ privata instruado okazos dum libertempoj ĉe la liberigitaj regionoj. La celo estas, penetrigi ĝis en la plej malgrandaj komunumoj la ĝustan impreson el vizito al la "ruinaĵa lando", de neniu bildo aŭ rakonto naskeblan. Ĉiuj vojaĝelspezoj estas pagotaj de la supre diritaj asocioj. Kia kortuŝanta prizorgemeco! Kia sinforgesemo!

Kiun agadon ni devas entrepreni

Principoj. — Pro tiaj cirkonstancoj viglan agadon ni devas entrepreni. Ni tuj ĝin entreprenu alimaniere ol per protest-tagordoj. Estas necese, ke ni klopodu al efektiva „higiena“ propagando, al penetradlaboro en la laboristamasoj kaj ni insistu niajn kamaradojn edukistajn. Ni devas ekprotesti pro skrupulo profesia kontraŭ la trorapida interpretado de la faktoj pri la granda epopeo. Pri ĝiaj devenoj ni ne forgesos la parolon de la rusa revoluciulo: "dek milionoj da viroj estas mortigitaj, dudek milionoj kripligitaj, nur por decidigi, kiu el angla aŭ germana kapitalismo pleje riĝiĝos". Cetere Edukistara Internacio certe disdonos al ĉiu nacio pli aŭ malpli grandan parton da prirespondecoj.

Ni devas nepre, ĝenerale, kontraŭbatali la influon de la skribaĵoj, kiuj celas ĉiam rifuzigi ĉiujn senkulpigantajn atestantojn de la kontraŭulo, kaj transporti la tutan kulpecon aliflanken. Ni maldeziros kaj kontraŭbatalos ĉiujn unuflankajn pruvrezonadojn.

Persona agado. — Ĉiu instruisto devas do zorgege kritiki la lernejajn lernolibrojn, kiun li uzas. Lia instruadmaniero devas korekti la tendencojn de la malbonaj libroj, kaj la ŝajne plej sendanĝeraj estu severe kontrolataj! Ĉiu instruisto devas rifuzi ankaŭ klarigi tendence la faktojn. Estas necese ekmiliti kontraŭ la estroj, kiuj volus trudi trofruajn raportojn pri la historio de la lastaj malserenaj jaroj.

Bojkoto. — Aliparte ni bojkotos la sentime partiajn librojn. Estos do serĉa, centraliza, bojkota laboro. Nia federacio kunhelpos. La federacia bulteno "Ecole émancipée" (Emancipita lernejo) same ankaŭ. Se la metallaboristoj ne plu devos fabriki pormilitajn municiojn, se la

maristoj ne plu devos transporti mortgilojn, la instruistoj devos disvastigi nek malamon, nek militeman socialismon.

Ni paroligu Peyrache: (tagordo de la "Bouches-du-Rhône" a" sindikato — 22^a julio 1920). "La sindikato . . . incitas ĉiujn geinstruistojn peti, ke ĉiu nova libro enhavanta tekstojn tendencajn pri milito estu rifuzata, ke aliparte la jam akceptitaj libroj estu same rifuzataj, se post reverkado tendencaj ili estas. Estas necese, ke tiu agado estu farata en tuta Francio. La eldonistoj timantaj la nevendotajojn meditos . . ."

La Pichard'a kodo (leĝaro) sciigas al ni, ke la regularo ebligas nin bojkoti malbonajn librojn. Je la momento verki liston de la libroj akceptotaj de l'administracio, la geinstruistoj povas peti sciigojn pri la faritaj proponoj, kaj postuli sekve prokraston aŭ ne de la decido. Tia prokrasto estas laŭleĝa.

Propagando. — Aliflanke ni devas montri al ĉiu ano de Geinstruistaro, ke la burĝa klaso petis de ili dum la milito, servemon al privilegiuloj, kaj ke ĝi petos de ili morgaŭ, ekmiliti kontraŭ proletariaro emancipiĝanta. La nacioj ja ne plu batalas en la giganta duelo, sed la internaciigitaj klasoj sin observas kaj ekokupas siajn balapoziciojn.

Ni devas uzi propagandilojn, cirkulerojn, afiŝojn, ĉiujn fakajn revuojn por komprenigi al la lernejojficistaro la rolon de trompato, kiun al ĝi oni ludigis dum la milito, kaj la kriman kaj fratmortigan rolon, kiun oni deziras ludigi al ĝi kontraŭ niaj fratoj el Rusio. Oni volas amasigi montojn el kalumnioj. Ni rifuzos fari tion. Ni petos de la instruadproletariaro fari same kiel ni, ĝin instigante kompense sin instrui pri la profundaj reformoj plenumitaj de la kuraĝaj moskvaj komunistoj, tiuj samaj, kiuj antaŭe putris la germanan armeon.

Pro la libroj, kiujn oni uzigas al ni, Franco post 1920 estos sama, kia Germano antaŭ 1914: Li pli havos superregemon ol Germano venĝemon. Ni morale devas ekkoni la demandon al la geinstruistaro kaj al la popolo. Do, propagandilojn, afiŝojn, konferencojn, popolkunvenojn. La geinstruistara federacio faros nenion, tiel longe ĝis ĝi ne estos farinta ĉi tion: densan agitadon por natura sana lojala senpartia homa edukado. Estas necese, ke la lernejo ne stultigu same, kiel la preĝejo. La agado entreprenota estas revoluciema kaj emancipiga.

Same kiel niaj Majstroj tion petis de ni, ankaŭ Edukistara Internacio trudos tion. Ni devas "malamigi malamon", ekmiliti kontraŭ ĉi tiu malbelega burĝemo, kiu konsistas el "malfido kaj envio", kontraŭ ĉi tiu egoismo, "kiu serĉas sian feliĉon en la najbara malfeliĉo", kontraŭ „ĉi tiu malsaneca glogregado pri mortigo kaj morto pro barbara patrujo.

Konkludo. — Tio ne estas nur pedagogia demando, sed ankaŭ socia plejaltgrade grava. La regantaj klasoj estas gvidataj per nenia idealo krom komerca imperialisma politiko, praktikata de ĉiu malnova reganta oligarkio. Hipertrufio de naciismo aldonas al antagonismoj — revoluciaj simptomoj jam tiel signataj — tiu naciismo petas genufleksiĝon antaŭ ĝi, tiam, kiam sonis la horo de internaciismo kaj tutmonda interpopola kunlaborado. Nova idealo estas necesa, idealo el frateco (ne el malamo), premsignita per la certaj de Scienco kaj Historio, de tutmonda Ekonomio kaj de realajkompreno. Tiu scienca idealo povas nur esti la komunismo, pri kiu devas sin inspiri Edukistara Internacio.

Nekrologio

Clara Meyer-Wichmann

La nerezistebla morto forrabis al la Nederlanda revoluciema laboristaro kamaradinon «Advokatin Clara Meyer-Wichmann», kiu en la anarĥo-komunista movado okupis gravan lokon. Antaŭen puŝata de alta idealismo, ŝi, elveninta el burĝa familio, kunbatalis kaj servis per sia povo de scio la liberigan batalon de l' proletariaro. Laste ŝi verkis projekton por organizo-formo bazata je konsilantarsistemo, kiu, akceptata de la laborista movado, ĝin liberigos el burokratio pro konstanta gvidantareco. Labori al efektiviĝo de ĉi tiu projekto, de nun estus ŝia vivocelo.

Sed, ne povas esti

Semajnon pasintan ŝi ricevis leteran sciigon per kiu «Loĝio 14» komunikas al ŝi, ke ĝi verdiktis pri ŝi la mortpunon, pro ŝia . . . favore al kapitalismo laboro . . . Ĉu nia kamaradino, en stato de ĝoja atendo (!), travivus tian abomenan atakon? Ĉu ĝi ne rompigus la noblan koron kaj nervojn?

Post akuŝo, la 16—2—'22, ŝi mortis je aĝo 36 jara.

«Loĝio 14», vi povas esti kontenta! Sed, kiu ajn vi estas, estu malbenata!

Tiel ni perdis unu el la plej eminentaj kunbatalantoj pri kies meritoj ĉiuj gazetoj, burĝaj kaj laboristaj, enhavas majestan pro ŝia alta karaktero kaj laboroj nekrologion.

Neniu tamen aludas je la terura preludo el ŝia morto; nek en gazetoj, nek en paroloj ĉe la kremacio. Certe estas, ke parol- kaj skribkapabluloj scias pri tio. Vane mi turmentas al mi la cerbon por kompreni de tio la signifon.

Ĉio silentas! Ho, vero vi donu lumon! Ĉu vereco ne ekzistas? Ĉu ĝi foriris kun nia mortintino je kiu ĉia farizeismo estis malproksime?

K. Homo

DIVERSAĴOJ

Por plej trafe instrui Esperanton

Mi havas tutan novan „sennaciecan“ instruadmetodon per kiu ĉiu povas lerni: *internacie* pensi, kompreni, paroli kaj koncepti esp.on. La ĝisnunaj „naciilingvaj“ metodoj estis malbonaj, ĉar ili la internacian lingvon per nacia lingvo instruis. Ĉi tio estas absurdo! Ĉar absurdo estas: *internacian lingvon per nacia lingvo instrui*. Miaj instruoj (ankaŭ la sengramatikuloj¹⁾) ne sciis mian kaj mi ilian lingvon kaj tamen ili perfekte ellernis la internacian lingvon; eĉ unu: *G. Csikánj* (Braŝov) atingis la unuan premion en konkurso literatura de „Esperanto“ (dec-a U-o. 1921).

Mi instruadas ĉiam senescepte *nur* la sencon de la esperantaj vortoj kaj ne ilian tradukon, *la praktikan aplikadon* de gramatiko kaj vortfarado, kaj ne ilian nacian idiomon. Premiita Csikány ankaŭ hodiaŭ ne scias la hungaran sencon de radikvortoj. Do mia metodo estas vere „sennacieca“, tiel la plej bona kaj rapida, kion miaj sukcesoj pruvas.

Ĉi tiun metodon oni devas disvastigi: Sed kiel? Oni konsideru: *Mi estas oratoro, agitisto, intruisto, aŭtoro kun novaj ideoj, unuvorte verkisto en la ĝenerala senco de l'vorto*, kaj tiel mi grandajn sukcesojn povos atingi en ĉefurboj (kiel mi atingis dum kaj antaŭ komunumo en Budapeŝto).

Nun mi estas en lando, kie regas plej granda teroro, kaj ĉiumomente atendas esti ĵetata en malluman karceron. Kiuj helpas al mi por eliri el tiu situacio, utiligante miajn kapablojn por instrui kaj propagandi esp.on? Ĉiujn proponojn kaj monhelpojn oni sendu al la Redaktoro de S. R. kiu kvitancos ĉiun sumon en la gazeto.

(1) Gravedeco.

(2) tiel mi solvis la demandon de dr-o Carbone (v. la dec-an N-on, 12p.)

Propono

Nia poresperanta propagando atingis jam la diversajn faksocietojn; ĝi estas en la stato per realaj faktoj pruvi al la gvidantaro de la laboristaro la taŭgecon de inter. lingvo kiel oficialan servilon por la tutmonda laborista movado. La pro persona korespondado ne sufiĉas kiel fakto pruvkapabla, ni devas surpaŝi la organizon de interilato inter la diversnaciaj esp. lab. societoj. Tiucele mi proponas: En ĉiu lando ekzistu redakcio enhavanta la plej klerajn S. A. T.anojn kiel kunlaborantojn. Ĉiu tiuj diverslandaj redakcioj kunagadus por fari la „Internacian esp. lab. fama servadon. Ĉiu redaktoro pretigus po monate riĉenhavan raporton pri la enlanda laborista movado, kaj sendus ĝin al centro, kiu kunigus la raportojn, kaj pere de litografado multobligus tiom da kajeroj enhavantaj la raportaron, kiom de redakcioj ekzistas. Ĉi tiuj lastaj elĉerpas, el la raportaro kion ili bezonas por fari tradukojn kaj por la lab. organoj.

Do kamaradaro pripensu kaj sendu viajn opiniojn al mi, kiu ĝis pli konvenan kamarado(j)n ni trovos, organizas mem ĉion *Mi petas la adresojn de tutmonda esp. lab. societaro.*

JOHANO TOMAN, Budapeŝto IX, Gatstr. 25, 1/8.

Afabla invito

Cassel estas belega urbo, kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas ne malpli admirinda —, precipe la fama Wilhelmshöhe, la Herkules kun la kaskadoj, k. t. p. — La S. A. T. kongresanoj kiuj trapasos Cassel devos tie halti kaj ekskursi. La tiea S. A. T. anaro ilin invitas. Shribi antaŭe pri alvenado al K^{do} Frederik Deiters, Schillerstr. 29 H. II. Cassel.

Interhelpo

Mi deziras ricevi en eksterlando loĝejon por 1—2 monatoj, kie mi finu mian verkon pri sennacio. Krom dezirata laboro, helpo en propagando k. t. p. mi povos alpagi. Anoncojn „por redaktoro“ al Pola Esperanto-servo, Bydgoszcz, Polujo, str. Kordeckiego 1 A.

Socialista redaktoro deziras verki en esp. o artikolojn ekonomiajn, politikajn kaj korespondaĵojn pri Polujo, tradukotajn nacilingven, anoncojn kiel supre.

Preseraroj

En la lasta n^o enŝoviĝis kelkaj, kiujn estas necese korekti: paĝo 2^a, unua kolono, 6^a linio de supre, anstataŭ „de“ oni legu *se*; paĝo 3^a, dua kolono, 4^a linio de malsupre, anstataŭ „Haljanskaja“ oni legu: *Italjanskaja*; paĝo 4^a, dua kolono, 4^a linio de supre, anstataŭ „al“ devas esti: *la*; paĝo 5^a, 1^a kolono, 21^a linio de supre, anstataŭ „kiuj“ oni legu: *kiu*; paĝo 10^a, dua kolono, lasta linio de la 3^a strofo, anstataŭ „rajturo“ oni legu *rajtaro*; paĝo 15^a, 1^a kolono, 27^a linio de supre, anstataŭ „(X)“ devas esti: (IX); sama paĝo, sama kolono, 32^a linio de supre, la adreso de K^{mo} Besnard estas erara. Oni korektu jene: 22 rue Popincourt, Paris (XI). Estas ankoraŭ kelkaj aliaj eraretoj, (komoj ne ĝuste lokitaj aŭ forgesitaj, „o“ anstataŭ *a* k. s.) sed ili ne povas grave erarigi la legantojn.

La vortoj „alies“ kaj „aliel“ ne enhavas preserarojn, kiel plendas iu kamarado. Tiuj formoj, samkiel „alio“, ofte uzata, kaj *aliu, aliam, aliom, alie* estas facile kompreneblaj de ti-kiuj sentas la veran spiriton de nia lingvo, — kiu ne devas ŝtoniĝi, kiel okazus se oni atentus pri la riproĉoj de la fanatikaj fundamentistoj.

KRONIKO

Anglio

London: En la februara n^o de „Communist Review“ aperis artikolo pri internacia lingvo kun komparo inter la angla kaj esp.-o. La „maldekstra“ ĵurnalo „Workes Dreadnought“ ĉiusemajne enhavas esp. notojn. La lecionoj tie presitaj estos eldonataj en malkara libro. Eble ĉe la B. E. A. Kongreso la soc. esp.-istoj vekigōs. Ampleksa kaj taŭga estas la prisemota kampo sed malmultaj la prisemantoj. — Ĉu kamaradoj alilandaj komencis traduki la pamfletojn de Marx kaj Engels? Oni bonvolu informi min. *Mark Star*, 100 Grosvenor Rd. Westminster. London S. W. I.

Belgio

Bruselles: La tiea proletaria grupo, kaj la S. A. T.-anoj kunvenas ĉiumarde je la 8^a ĉe Carboneille, 23 Boul. Lemonnier. Tion notu la K^{doj} trapasantaj la urbon.

Bulgario

Sofia: La Komunista esp.-grupo, „Balkana Liberiga Stelo“, faras regulajn kunvenojn ĉiudimane en la Sindikata Domo. Estas preparata por eldono propaganda libreto „Internacia lingvo pri proletariato“. La grupo anigas al S. A. T. ĉiujn siajn membrojn, kiuj jam havas sufiĉajn konojn en esp.-o. La ceteraj provizore restas membroj nur de la grupo. Ĉi petas la alilandajn kamaradojn sendi al ĝi broŝurojn, gazetojn k. a., novajn aŭ malnovajn, enhavantajn artikolojn, kiuj traktas la demandon pri lingvo internacia kaj laboristaro (bezono, utilo ktp.). La artikoloj povas esti en ia ajn lingvo. Oni sendu al: „Balkana Liberiga Stelo“, str, Veslec 10 — Sofio (Bulgario).

Germanio

Freital (Saksio): Depost fondo de laborista esp.-grupo kun sukceso la ĉi tiea esperantistaro entreprenis viglan propagandon kaj varbadon. Post klariginta rakonto pri organizo kaj celoj de „S.A.T.“ nia grupo unuopinie decidis dum la venonta „Glea“ tago (Pasko 1922) en Düsseldorf rekomendi aliĝon al „S.A.T.“ Pasintan monaton, ni malfermis kurson kun 25 p. Alia kurso gvidata de nia kd. Schlesier funkcias ĉiumarde Pro „S.A.T.“ aferoj sin turni al kd^o P. Philipp Luisenstr. 1, Freital-Deuben.

Leipzig: La 15-marto, la presistoj kunvenintaj voĉdonis la jenan (mallongigitan) rezolucion: „Pro la neceso de intern... kunlaborado inter ĉiuj lab. organizaĵoj ĉiulandaj kaj malhelpo de la malsamlingveco, la kunvenintoj (presistoj kaj stereotipistoj) decidis enkonduki esp.-on en Internacia Presistsekretario kiel lingvon por la korespondado; rekomendas la eklernon de tiu lingvo al ĉiuj aliĝintoj de la I. B. S. por liberigi la int... kongresojn de la lingva kaoso...“

München: Laŭ invito de la Munĥena Lab. Esp. Grupo, okazis „distrikta konferenco“, (11—12-marto). Ĉeestis delegitoj el 5 bavaraĵ Lab. Grupoj. Kaj ankaŭ delegito el Linz (Aŭst.). Oni elektis por la fondota „Propagando-Distrikto“ la jenan. estraron: Prezid. K^{do} Deubler. — Sekr. K^{do} Winter. — Kas. K^{do} Hauber. — La ĉefdemando en la kunsido estis: „Ĉu ni bezonas mondorganizaĵon? Kiel ni formu ĝin? — Unuopinie estis esprimate, ke mondorganizaĵo de la Lab. Esp.-toj samtempe devas propagandi esp.-on inter la laboristaro, samkiel U. E. A. kunligas la Esp.-Propagandon kun la praktika uzado. La nunaj naciaj asocioj fariĝus propagando-institutoj en la kadro de la mondorganizaĵo. La delegitaro de la „bav. prop. distrikto“ esperas ke oni interkonsentos je la okazonta S. A. T. kongreso en Frankfurt pri la akcepto „Propagandi esp.-on“ en la S. A. T. statuto, ĉar oni ne povas imagi mondorganizon sen propagando (!). La S. A. T. temo

estis diskutata vige. — La delegitaro konsentis preskaŭ unu-voĉe kun la opinio de la *Munĥena Grupo*. — Plue oni diskutis pri la nacia kongreso de G.L.E.A. en Düsseldorf. Rilate al propagando oni pritraktis, ke estas necese interesi la redaktorojn de soc. gazetoj kaj la soc. partiojn. Por ebligi tion estas necese, ke ĉiu esp. laboristo samtempe estu fervora sindikatano kaj socialisto. — La sekretario *A Winter*

Norvegio

Kristiania: Post celkonscia prop-do inter laboristoj ni atingis bonegan rezultaton: Nuntempe 5 kursoj funkcias kun pli ol 100 partoprenantoj. Nur mankas al ni taŭgaj instruantoj. Tial ke ni, neneŭtralaj, iras propran vojon la burĝaj esp-istoj ŝajne ne volas instrui ĉe niaj kursoj. Tamen kie estas volo, tie ankaŭ troviĝas rimedo. Ni antaŭvidas grandan sukceson por nia afero. — *Reaperanto*

Portugaliao

Lisboa: Lastmonate starigis nova grupo de antaŭenemaj esp-istoj en *Olivais* (ĉirkaŭaĵo de Lisboa). Kurso okazas en laborista fako de la nomita urbeto. La nomo de la grupo estas "Lumo de la Libereco". — Grupo de antaŭenemaj studentoj, "Liberā Homaro", funkcias provizore ĉe Komisa Sindikato. — Aperis 1^a n^o de "La Vero" monata folieto por diskonigo de esp.o. Ĝi publikigas elementan kurson. — Regule funkcias kursoj ĉe "Lisbona Verda Stelo", antaŭa "Lab. Esp. Societo". Pro blanka teruro multaj membroj de tiu grupo estas enkarcerigitaj. Enkalkulante ne-esp.-istojn, pli ol 600 kamaradoj estas nun malliberigitaj *F. C.*

Rusio

Moskvo: La 6-marto okazis en Politeknika Muzeo diskutado pri esp.-o. Ĉeestis fama rusa lektoro *V. A. Posse*, *S. Hajdovskij*, *H. Drezon*, *V. Javoronkov*, *N. Futerfas*, *M. S. Valentinov*, *Robičak* kaj *K^{do} A. Habibi*, reprezentanto de Baŝkira Respubliko. La diskuto estis plene favora por esp.-o. Ĥoro de blinduloj kantis esperantlingve. Estis aranĝita ekspozicio de esp. gazetoj. Multaj personoj enskribiĝis por lerni la lingvon. 4.045.000 rubloj estis kolektataj por malsatantaj infanoj.

Kursoj okazas en klubo de poŝtovicistoj, ĉe laboristoj de elektra stacio kaj ĉe laborista fakultato.

En Moskvo ekzistas "Asocio de Natursciencistoj", kiu ricevas monan subtenon de *Narkompros* (Popolkleriga Fako); tiu asocio eldonas bultenon kaj deziras aperigi specialan esp.-aldo-n rezumaron de la artikoloj. Bezonante kunlaborantojn por lingvaj konsilioj kaj elserĉoj en malnovaj esp. gazetoj por tradukado kaj starigo de terminaro, la asocio petas la sciencistojn pri komuna kunlaborado. Adreso: Rusio, Moskvo. Ĉudovskoj per., N. 6. Komitato de esperantistoj al *M. Valentinov*, por studendo-matematikisto *I. Ivanov*. — Laŭ komunikado de *M. S. Valentinov*.

(1) Verŝajne niaj bav. K^{doj} ne volas (ĉar estante inteligentaj ili certe kapablas) kompreni aferon tamen tre simpla: La statuto de S. A. T. tute ne malpermesas al niaj membroj, ke ili propagandu esp-on. Tio estus vere stranga!!... Sed, ĉar la tasko de porpraktika organismo ne estas sama kiel tiu de porvarba (nur la celo estas sama, komuna) estus tute maltrafe intermiksi en sama organizaĵo du taskojn malsamajn. Ekzemple: ĉe vivanta estulo la koro kaj la stomako havas saman celon: la sanon de la individuo; sed ili havas malsaman taskon. Pro tio la du organismoj estas tute apartigitaj kaj tute malsimilaj. Ni imitu la vivon. — *E. L.*

Por Bulgario abonpagojn je *Sennacieca Revuo* kaj membrokotizaĵojn je S. A. T. kolektas *K^{do} P. Kolev*, str. Regentska, 19 — *Sofio*.



Eldonaĵoj ricevitaj

Libroj

Himnaro Esperanta. Eldonis *Brita Esp. Asocio*, 17 Hart street, London. W. C. I. Formato: 9 × 16 cm, 136 pĝ. Prezo: 1 ŝ. 7 p. (8 resp. kup.)

La Eksperimento de Eccles kun notoj pri la instrudemandoj, de Elizabeth Hocc. Sama eldonejo kiel supre. Formato: 12 × 18 cm., 24 pĝ. Prezo: 10 p. (4 resp. kup.)

Unuaj Paŝoj. Facila legolibro por lerneja legado. Kunmetis kaj aranĝis *Alexandra Mexin*. Eldonis "E. D. I. P." Passage Terraillet 18, Genevo (Svisio). Formato: 15 × 23 cm., 136 pĝ. Prezo nemontrita.

Pri la internacia lingvo de Iv. H. Krestanoff. Eldonita de *Bulg. Esp. Biblioteko*. Formato: 14 × 21 cm., 24 pĝ. Prezo nemontrita. Tiu bulgarlingva broŝuro estas enketo inter bulg. scienculoj, verkistoj kaj artistoj. Ĝi estas havebla ĉe la adreso de l' aŭtoro: Nikolaiŝtr. 4b, Dresden A. (Germ.)

Prospektoj

Wiesbaden Internacia Banurbo. Tiu belilustrita sespaĝa prospekto estas ricevebla senpage de Verkehrsverein Wiesbaden. II. Viena Internacia Foiro. Formato: 16 × 24 cm.

Gazetoj

Brazila Vivo duonmonata revuo en esp. kaj portugala lingvoj, politike kaj religie neutrala (1, 2) Formato: 24 × 32 cm., 8 pĝ. Adreso: Rua General Sampaio, 330, Fortaleza, Ceará (Brazilio) Abonprezo: 25 resp. kup.

Juna Esperantisto organo de Petrograda Unuiĝo de junaj Esp-istoj. Okpaĝa gazeteto hektografita. Adreso: Petrogrado, Italianskaja 31 (Rusio) Prezo: 5000 rub., afrankite, 8000.

Memornoto: 1. Gazetoj tute en esp.o: Esperanto Triumfonta (74 ĝis 78), Literaturo (13), Hispana Esp.isto (55), La Eklezia Revuo (15—16), Litova Stelo (2), Nova Eŭropo (2—3), Export Esperantist (2), Vegetarano (2), La Progreso (3), Esperantista Junularo (6), Novaj Tempoj (2), Verda Utopio (1), La Unuigita Tuthomaro (Jan., Febr.), Kataluna Esp.isto (3), Kristana Espero (1), Katolika Mondo (7), Nova Tempo (22), Libero (15), Internacia Pedagogia Revuo (3—4—5—6), Hungara Esp.isto (3), Espero Katolika (126), Esperanto (3).

2. *Esp. Gazetoj dulingvaj*: The British Esp.ist (204), La Semisto (27), Bizantio (6), Amerika Esp.isto (3, 4), Der Arbeiter-Esp.ist (4), La Interŝanĝo (12), France Esp.o (3, 4), La Espero (3), Le Monde Esp.iste (1), Antaŭen (4), Marto (3), Germana Esp.isto (3), Bulgara Esp.isto (6), Egipita Esp.isto (3), Esperanto Praktiko (3).

3. *Enhavantaj esp. artikolojn aŭ tradukaĵojn el S. R.*: Tagblatt (62). Represas la alvokon de la hispanaj kamaradoj. Zorgis pri la traduko *K. Deubler*. Deutscher Eisenbahner (12). Priespa artikolo de *K. Deubler*. Svoboda (146). H. Barbusse pri esp.o. Social-Demokrat (58). *Reaperanto* tradukis kaj represigis en tiu grava jurnalo la alvokon de la Hispanoj. Kalmar Lāns-Kurieren (13). Represas la tutan antaŭparolon de H. Barbusse por esp.-lernolibro. *K^{do} Peterson* atingis tiun sukceson. The Plebs (3) Esp.a fako, portreto de H. Barbusse. Nova Sociedade. Le Sincérisme (4). Esp. fako. No More War (2). El Heraldo Naturista (3). A Comuna (81, 82). Le Syndicaliste des P. T. T. (152). Priesperanta artikolo de P. Filiâtre. Le Chrétien Libre (137) Travail.

4. *Mondlingvaj*: Mondo (3), Suisian Idisto (4), Amiko Idista (13), Libereso (3), Lingvo Internaciana (1, 2, 3), Bulletin Français-Ido (39—40), Esperantida (2), La Feuille (4).

5. *Diversaj*: La Rose + Croix (3), Le Mutilé (42), L'Ecole Emancipée (24, 25, 26, 27), La Bataille (34, 35, 36), La Vie d'Outre-Tombe (6), Le Néo-Naturien (3), Exangelos (12), L'Emancipateur (16, 17), La Revue des Primaires (5—6), El Naturista (2, 3), Le Réveil de l'Esclave (21).

Sennacieca Asocio Tutmonda

23. Rue Boyer, Paris-XX^e

OFICIALA INFORMILO

Celo: Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la statuton).

Jarkotizo: Laŭ valoro de unuhora salajro meza = Anglio, 17 pencoj; Aŭstrio, 42 kr.; Belgio kaj Francio, 2,50 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 8,50 lev; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 7 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 1,70 kr.; Germanio kaj Finnlando, 7 Mk.; Hispanio, 2 pes.; Hungario, 17 kr.; Italio, 3,40 lir.; Nederlando, 0,85 Guld.; Polio, 85 Mk.; Svisio, 1,70 fr. sv.; Usono, 35 cend., k. t. p.

Membreco kun jarabono al «Sennacieca Revuo»: Multobligu la tarifon de membro per 4. — Ekz.: en Germanio, membro pagas 7 Mkg., abonanto 25 Mkg., membro-abonanto 28 Mkg.

(La landoj, kies monkurzo estas malfavora rilate al franca franko, pagu pretere per naciaj monbiletoj, en registritaj leteroj; la aliaj laŭvole).

*

Kiam aperos ĉi-tiuj linioj, restos apenaŭ 3 monatoj antaŭ nia 2^a Kongreso: tempo tre mallonga konsidere la farotaj...! sed, certe la fervoro kaj kutima laboremo de la S. A. T.anoj kompensas tiun tempo-mankon.

La plej urĝa devo estas sendi sian aliĝilon al kongreskomitato. Tio tre helpas al niaj Frankfurt'aj Kamaradoj kiuj, por iuj aranĝoj, bezonas scii kiel eble plej frue la nombron da kongresanoj.

Ni pensu ankaŭ pri kio ni faros ĉe la kongresaj kunsidoj. Ni jam diris ke ni estas pretaj publikigi ĉiujn proponojn pri statuto aŭ ĝenerala agado de S. A. T. Povas esti ke la praktiko montris la netaŭgecon aŭ mankon de iuj paragrafoj el la nuna statuto; nu! jen demando ekzamenota, jen interesa studotaĵo. Samkiel pasintjare antaŭ Praha, ni ripetas ke la anaro ne devas fide dormi sur la kompetenteco (?) de la Komisiono. Certe, la ĉiutaga funkciado de la organismo malkaŝigis al ni iujn mankojn kaj difektojn de l'sistemo, tamen ĉar la vidpunkto de la membroj estas alia ol nia, sekve iliaj kritikoj kaj juĝoj estas aliaj ol niaj. Niaflanke, ni prezentos niajn proponojn, sed ankaŭ siaflanke la membroj vortigu sian juĝon. Ni ilin petas sendi al ni siajn sugestojn kiel eble plej frue. Ĝenerale estus necese ke, ĉiuj gravaj proponoj estu publikigitaj en *Sennacieca Revuo* antaŭ la Kongreso, tiamaniere ke ĉiu membro povu ilin ekzameni funde, kaj — eble — prepari kontraŭan tezon. Tiel, ni ne perdos utilan tempon ĉe niaj kunsidoj, kaj la diskutoj estos despli klaraj kaj rapidaj.

*

La lavango daŭras; la S. A. T.anoj senkompatate premeblas la... aŭtoron de ĉi tiuj linioj. Ĝis antaŭ nelonge, *Wien* staris ekster nia movado; subite ĝi naskis 8 S. A. T.anojn, (ĉiuj abonantoj); jen utila adreso tiea: K^{do} Vladimír V. Vajda, Schottenfeldgasse 86 1/10, *Wien* VII; same, *Mannheim* jus akt. sis 9 S. A. T.anojn; la feliĉa patro estas K^{do} Georg Schmitt, Küfer, Kronprinzenstr. 152 II, *Mannheim* (Germ.); — nia K^{do} Panajot Kolev, Str. Regentska 19, *Sofia* (Bulg.) varbis 14 novajn samidealanojn en *Sofia* kaj apudaj urboj; gratulinda sukceso kiu, espereble stimulos la aktivecon de la aliaj "varbistoj"; — novaj anoj en Leipzig, Lyon, Cassel, Ingolstadt. Ornsköldsvik (Svedio) ktp.

Laŭ tiu rapideco, antaŭ unu monato ni estos 1000 membroj. Tio estas bela rekompenco al nia penado, kaj nin incitos penadi ankoraŭ pli.

*

Kelkaj membroj ne ankoraŭ pagis la 1922-jaran kotizon. Tiu estas petataj kvitiĝi kun nia kaso plej baldaŭ. Cetere, ni ripetas ke tio estas nepra kondiĉo por ricevi la jarlibron.

*

Nia financa agento en Germanio (K^{do} Richter, F., C., Sommerfelder Str. 44 ptr., Leipzig-Stött.) nin petas anonci, ke li prenis poŝtĉek-konton; niaj multnombraj membroj kaj abonantoj germanaj povas do ĝiri sian monon jene: poŝtĉek-konto N^o 45170 — Leipzig, Richter. Ili sekvu la intrukciojn de la lasta "informilo".

1 aprilo 1922 la sekretario de S. A. T.



KORESPONDADO

TARIFO: Unu enpresoj, 0 fr. 75. — Tri enpresoj, 2 fr. Dek-du enpresoj, 6 fr.

MALLONGIGOJ: L = letero. PK = poŝtkarto. PI = poŝtkartoj ilustritaj. PM = poŝtmarkoj. bfl = poŝtmarko sur bildflanko. k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj. Esp-ajo = Esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Belgio

K^{do} Léon Bergiers, 11 Rue Lauwers, *La Hulpe* (Province de Brabant). L, PK, k.ĉ.l.

Internaciistaj Instruistoj kiuj deziras korespondi pri pedagogia sindikata, korporacia temoj devas sin turni al K^{do} Van Aelst Maurice, 107 rue Emile Feron, *Bruxelles*: La ricevita korespondado estos tradukata, kaj publikigata en "L'Étincelle" (duonmonata organo de la Profesia Unuiĝo de Socialistaj Ĝeinstruistoj). Estos menciata, ke la informoj estas ricevitaj pere de Esp.o.

Ĉeĥoslovakio

K^{do} Viktoro Pselár, fertornisto, Jarkova ul 57, *Prešov*. Intencas komenci korespondadon pri sporto, tekniko kaj pri diversaj temoj per L, PI, k.ĉ.l. ĉiam respondas.

Samideanino *Elisabeto Brennwasser*, *Prešov*, Masarikova ul 63. Per PI k.ĉ.l.

Samideano *Eduard Friedmann*, fotografisto, *Prešov*, Dolna okr. 40. Pri ĉiuj temoj L, PI, k.ĉ.l. tuj respondas.

Finnlando

K^{do} Aapo Pärnänen, Alkutie 60, *Oulunkylä*, deziras korespondi pri filozofiaj temoj, k.ĉ.l.

Francio

K^{do} Ehm Marcel, 43 rue des Batignoles *Paris* 17^e k.ĉ.l. kamaradoj. Letere, interŝanĝas PK, PM.

Fino *Prima Larivière*, 14 rue des Lions, *Paris* (IV) deziras interŝanĝi PM, oni faru proponojn.

K^{do} Spego, poŝtrestante, *Puteaux* (Seine) deziras ekinterrilatiĝi kun fraŭlino-laboristino por vivi komunisme; malseriozulinioj sin detenu.

Germanio

K^{do} Ludwig Puff, Schwalbacher Str. 64 II, *Frankfurt a. M.*, pri seriozaj temoj kun militkripligitoj k.ĉ.l.

K^{do} Kurt Wallas, seruristo, Weidentalstr. 20 II, *Dresden* 29, L, PK, bfl, PM, k.ĉ.l.

K^{do} Karl Baumann, Werderstr. 24, *Frankfurt a. M. West* 13, PM, k.ĉ.l., en rekomendita letero; sendu la unuan.

Hungario

K^{do} Alardar Bán, Istvan ut 28 I/9 *Budapest* VII, kunlaboranto de "S. R.", deziras korespondi franclingve kun kleraj gesamideanoj pri ĉiaj temoj, krom politikaj.

Portugaliao

K^{do} *Figueiredo Simoes* (flegisto, anarkiano) *Lisbono*, Rua Nogueira e Sousa, 20, 1^o deziras Korespondi kun revoluciaj sindikatanaj aŭ anarkianoj, kiuj volas interesanĝi informojn pri socialaj kaj revoluciaj movadoj.

Rusio

K^{do} *A. K. Savostianov*, Arkadak, *Balasoŭsk U, Saratovsk*, Gub., deziras seriozan Korespond. Kun ĉiulandaj geko^l pri socia movado kaj soc. komun. anarĥismo, Nepre respond.

K^{do} *Sneŭko, Dimitrij*, Sluckaja ul d 434, *Kojdanovo* (Minsk, Gub.).

K^{do} *Bazilo, Averin*, Cuć. 3., Bakalda N. 30, *Astrahanj*.

K^{do} *Johan Isaenko*, Poŝtkesto n^o 34, *Serdobsk* (Saratova gubernio). Pri diversaj temoj k. ĉ. l.

K^{do} *Aleksandr Trofimoviĉ Samoilenko*, Instituto Komerca, *Rostov sur Don*.

Svedio

K^{do} *P. L. Lundqvist*, *Ornsköldsvik*, il. PK gaz., libr., monojn, portretojn, k. ĉ. l.

Leterkesto:

Iu (Prešov): Ĉu do *Dosztojevszkij* verkis en magiara lingvo? Tion mi malopinias. Pro tiu ĉefa motivo via tradukaĵo ne povas esti presota. Ni ne enpresas tradukon el traduko. — *E. L.*

Al niaj abonantoj

Ni petas ĉiujn abonantojn, *kies abono finiĝos en Junio*, bonvolu kiel eble plej baldaŭ sendi sian reabonon por eveli al si interrompon en la ekspedo de la revuo.

Ĉiu esperantisto nepre devas havi en sia Biblioteko la unuan volumon de la S. A. T.-literaturo:

Tri Verkoj de Tolstoj

El rusa lingvo tradukis J. M.

(Korektita kaj aprobata de Literatura Esperantista Asocio)

Kun portreto de la aŭtoro kaj antaŭparolo de **ROMAIN ROLLAND**

82 paĝoj.

PREZO AFRANKE: **1,50** franca franko por landoj kurzsuferantaj rilate al franca franko. Por anoj de S. A. T. nur **1,10** fr. fr.

3 francaj frankoj por Francio kaj ceteraj landoj — Por anoj de S. A. T. **2,25** fr. fr.

(Pagebla prefere per monbiletoj aŭ bankĉekoj.)
Havebla ĉe S. A. T., 23, rue Boyer, PARIS (XX^e)

Opinio pri la libro:

“Ni volonte konfesos, ke grava atentinda filozofa verko aperis en esp.o, ke ĝi estas bone tradukita kaj inde presita. Tio estas kompenso por multaj broŝuretoj aŭ infanaĵoj ne tre valoraj, kiuj svärmas en nia literaturo”.

(El „*Esperanto*“ organo de U. E. A. n^o 258)

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG.

Cours Rationnel et Complet
d'Esperanto

Préface de **HENRI BARBUSSE**

Eldonita de:

Fédération Espérantiste Révolutionnaire
23 bis, Rue Morère, PARIS, 14^e

Ĉiu franclingvano instruanta Esperanton devas nepre uzi tiun lernolibron.

Formato: 13 × 20 cm., 208 paĝoj

Prezo: 5 fr. francaj (Afranke: 5 fr. 50)

ĴUS APERIS:

For la neŭtralismon
de
Sennaciulo

Necesega broŝuro por propagandi la celon de S. A. T.

Prezo afranke: 0,50 fr. fr. por Francio kaj landoj kun monkurzo egala aŭ supera al franca franko.
2,00 mk. G. por germanio kaj ceteraj kurzsuferantaj landoj.

(la germanianoj mendu kaj pagu senpere al nia agento en Leipzig — K^{do} **F. C. RICHTER**, Sommerfelderstr. 44 — Leipzig poŝtĉeko 45170 :: la aliaj al ni mem en Paris).

Internacia, universala kaj sendependa estas

„Esperanto Triumfonta“

unua kaj sola Esperanto-ĵurnalo

eldonata ĉiusemajne, en granda formato (31 × 48 cm) de profesia gazetisto presata en propra presejo

Plej rapida informado Tekstoj nur en Esperanto

Modela laŭfundamenta stilo

Petu senpagajn specimenojn de la eldonanto:

sro **TEO JUNG**, Köln-Horrem
(Kolonjo, Germanio)

Egipta Esperantisto
oficiala organo de „Egipta Esp^o Asocio“

Adreso: 4 Farahdeh Str., Aleksandrio-Egipto
Prezo: unu n^o 2 respondkuponoj